# J. INGENIEROS

# LA TRIVIALA HOMO

(Esperantigis:
Enio Hugo Garrote)

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
110B 1976 3,50 FF

J. INGENIEROS

# LA TRIVIALA HOMO

(Esperantigis:
Enio Hugo Garrote)

Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
110B 1976 3,50 FF

# JOZEFO INGENIEROS

Jozefo Ingenieros naskiĝis en Buenos-Ajres la 24.4.1877. Ekde 1896 li komencis publikigi kelkajn eseojn pri sociologio kaj kriminala antropologio. Li diplomiĝis je medicino en la B.-Ajresa Universitato (1900), kaj li dediĉis sin al studoj pri nerva kaj mensa patologio. Oni nomis lin ĉefo de la Kliniko pri Nervaj Malsanoj en la Medicina Fakultato (1902-3), kaj li gajnis konkurse la katedron pri eksperimenta psikologio ĉe la Filozofia Fakultato (1904). Li reprezentis la Argentinan Respublikon ĉe la 5-a Internacia Kongreso pri Psikologio, okazinta en Romo (1905), kie oni nomis lin estro de la Fako pri patologia psikologio. En 1905-6 li vizitis la eùropajn universitatojn, donante sciencajn prelegojn, kaj verkante en la ĉefaj revuoj. Li fondis en Buenos-Ajres la Instituton pri Kriminologio (1907). Li estis prezidanto de la Argentina Kuracista Asocio kaj de la Psikologa Asocio. Ekde 1911 ĝis 1914 li kompletigis ĉe la Pariza, Lozana kaj Hejdelberga Universitatoj siajn sciencajn studojn, por dediĉi sin al la filozofio. Speciale invitis lin la Karnegia Fondaĵo por ĉeesti la Sciencan Kongreson en Vaŝingtono (1916). En 1925 la franca registaro invitis lin ĉeesti la solenojn pro la 100-a datreveno de la naskiĝo de Ŝarko' (Charcot). Samtempe la meksikia registaro invitis lin viziti tiun landon kiel "honora gasto". Reveninte al Argentinio li mortis la 31-an de oktobro 1925.

Liaj ĉefaj verkoj estas, laù merita rango : "La triviala homo"; "La simulemo en la lukto pro la vivo"; "Traktato pri amo"; "La simulado de frenezo"; "Psikopatologio en la arto"; "La Ameginaj doktrinoj" (vd. apr. Sennaciulo 1955); "Historio kaj Sugestio"; "Vojaĝaj Kronikoj"; "La filozofia kulturo en Hispanio". Liaj verkoj estas mendeblaj ĉe "Meridion Eldonejo", hispanlingve, Buenos-Ajres.

"La triviala homo", unu el liaj plej sukcesaj, konsistas el liaj lekcioj pri karaktera psikologio, donitaj de la aŭtoro ĉe lia katedro de la filozofia fakultato (1910). Dum tiu kaj la sekvinta jarojili estis publikigitaj de la ĵurnalo "La Nación" (Bs. As.), kaj poste kolektitaj en la "Analoj de Psikiatrio kaj Kriminologio" (1911). Kunordigita kaj korektita ĝi aperis unuafoje laŭ eldono de la "Renacimiento"-Biblioteko, Madrido, en 1913.

La aŭtoro intencis brulstampi la fatalajn moralajn ulcerojn, kiaj estas rutinemo, hipokriteco kaj servutiĝo, dezirante esti utila al la junuloj, kiuj povas eviti ilin, formi al si idealojn kaj nobligi sian vivon. Sed pli ol en la efiko de siaj paroloj li kredis en tiu de siaj ekzemploj : ekde kiam li eldiris desur la katedro tiujn lekciojn, finante sian eksteran "Karieron", je la aĝo kiam ĉiuj pretiĝas ĝin ekkomenci, li vivadis konforme al siaj principoj, rezignante ĉerpi profiton el komplicaĵoj kaj moroj, kiujn li konsideris nedecaj. Oni diris, tute vere, ke la plej abomenindaj uloj estas tiuj moralpredikantoj, kiuj ne akordigas sian konduton al siaj paroloj. Jozefo Ingenieros scias, ke malmultaj moralistoj povus verki tion, ne sentante la manon tremi...

Enio Hugo Garrote.

Glosaro :

**fatraso**: aro da ne plu utiligeblaj senvaloraĵoj en plena konfuzo.
**loza**: - malstrikta, malstreĉita, malkompakta.
- ne enpakita.
**lukro**: enspezo ricevata de iu por lia laboro.
**noca**: malutila. **rimorso**: konsciencriproĉo.
**ronĝi**: mordi, uzante la dentojn kiel ĉizilon kaj forigante maldikajn pecojn.
**torporo**: stato de korpa kaj mensa malvigleco.
**vori**: - krude manĝi, ŝirante per la dentoj - karakterize sin nutri per io.

(Tiuj vortoj estas troveblaj en PIV, laŭ la ĉi-supraj difinoj)

# La triviala homo

## I. La emocio de la idealo.

Kiam vi direktas la pruon de l'imago al iu stelo, en interno via mistera risorto de Idealo enestas. Sankta fajro ĝi estas : flegu ĝin. Se vi lasas ĝin estingiĝi, vi fariĝas inerta homa feĉo. Vi vivas nur pro tiu ero de revo, kiu levas vin super la realo. Sennombraj signoj ĝin montras : kiam vi admiras la klaran menson de la geniuloj, la virton subliman de l'sanktuloj, la grandajn agojn de l'herooj, kliniĝante ĉe la kreintoj de Vero kaj belo; kiam vi ekstaziĝas je krepusko, revas je aŭroro aŭ tremas je tempesto, ĉiuj homoj kiel vi estigas apartan rason el la Homaro : Idealistoj.

Idealo estas movo de la spirito al iu perfekteco.

## II. Pri idealismo bazita sur sperto.

Estontaj filozofoj metos la Sperton kiel fundamenton de ĉiu vera hipotezo. Ni povas senriske pensi, ke en estonta Etiko floros morala idealismo. La idealoj pri perfektiĝo, evoluemaj kiel la socia sperto, konsistigos la intiman vefton de doktrino de senfina plialtiĝo. Idealo estas hipotezo perfektigebla, efik-

anta laŭfunkcie de la socia vivo, kiu senĉese antaŭeniras. Idealo, el inter ĉiuj kredoj, reprezentas la plej altan rezultaton de la pensfunkcio.

Survoje al la perfektiĝo, la stadioj manifestiĝas sur la homa menso kiel idealoj. Ili formiĝas kiel ĉiuj fenomenoj submeteblaj al nia observado, kiel efikoj de kaŭzoj en la universala evoluo.

En la estonteco, la Filozofio ebligos priaserti ilian realecon kiel verajn aspektojn de la pensfunkcio, kaj restarigi ilin en la natura konceptaĵo de la Universo.

En la homa evoluo la penso senĉese varias, formante la idealojn, kiuj ne estas aprioriaj, sed induktitaj de vasta sperto. Ili reprezentas novan staton de ekvilibro inter pasinteco kaj estonteco.

Dum la instruado limiĝas doni la nociojn, kiujn la aktuala sperto konsideras pli ekzaktaj, la edukado konsistas el sugestado de idealoj favoraj al perfektiĝo.

La vivo nature tendencas perfektiĝi.

La formiĝado de idealoj estas submetita al determinismo, kiu, ĉar ĝi estas kompleksa, ne estas malpli absoluta. Ili estas proksimumaj kredoj pri la estonta perfekteco. Estonteco estas la plejbono de la estanteco, ĉar ĝi devenas de la natura selektado.

Laŭmezure kiel la homa sperto vastiĝas observante la realon, la idealoj estas modifitaj de la imago, kiu estas plastika kaj neniam ripozas. La sperto kaj la imago laŭiras paralelajn relojn, kvankam ĉi-lasta marŝas tre antaŭe de la alia. La imago estas patrino de ĉiu originaleco : ĝi kreas la idealojn kaj impulsas ilin per la iluzia sento de libereco. La deziro esti libera naskiĝas el la kontrasto inter du nebrideblaj motivoj : la tendenco persisti en la esto, enestanta en la heredo; kaj la tendenco pligrandiĝi en la esto, enestanta en la variado. Unu estas stabiliga principo; la alia, principo progresiga.

En ĉiu idealo estas principo de sintezo kaj de kontinueco : ĝi estas fiksa ideo racia aŭ fiksa emocio pasia.

La idealo estas ĉiam individua. Kolektiva idealo estas la koincido de multaj unuopuloj pri sama dezirego perfektiĝi. Ĉiu epoko, jarcento aŭ generacio povas havi sian idealon, kiu kutime estas aparteno de elito, kiu sukcesas trudi ĝin al venontaj generacioj. Povas ĝi enkarniĝi en geniulo : ĝi estas komprenata komence nur de eta aro da spiritoj tuŝeblaj de la nova kredo.

Ĉiu idealo estas fido je la eblo mem de perfektiĝo. Idealo ĝi estas por tiu, kiu sincere kredas je ĝia vero aŭ ĝia grandiozeco. Limigi idealon al dogmo de metafizika skolo, egalvaloras kastri ĝin.

Tiom da idealismoj ekzistas kiom da idealoj; kaj tiom da idealoj, kiom da idealistoj; kaj tiom da idealistoj, kiom da homoj kapablaj imagi perfektecon kaj vivi celante al ĝi. Oni forrifuzu la monopolon de la idealoj al ĉiuj, kiuj postulas ĝin je la nomo de filozofiaj skoloj, moralsistemoj, religiaj kredoj, sektaj fanatikismoj aŭ estetikaj dogmoj. La dezirego pri perfektiĝo povas animi same impete la filozofon monistan kaj la dualistan, la teologon kaj la ateiston, la stoikiston kaj la pragmatismanon. La aparta idealo de ĉiu kontribuas al la tuta ritmo de ebla perfektiĝo, kaj ne malhelpas la similan strebadon de la ceteraj.

La individua strebado al la virto povas esti tiel bonege pripensita kaj efektivigita far la aristotelano kiel far la cirenano, far la kristano kiel far la anarkisto, far la filantropo kiel far la epikurano, ĉar ĉiuj filozofiaj teorioj estas same kongruaj kun la unuopa sopiro al la homa perfektiĝo. Ili ĉiuj povas esti idealistoj, se ili povas lumiĝi de sia doktrino; kaj en ĉiuj doktrinoj povas rifuĝi homoj dignaj kaj parvenuoj, deculoj kaj friponoj.

Nur la sperto decidas pri la valoro de la idealoj, en ĉiu epoko kaj loko. Dum la paso de la socia vivo ili nature selektiĝas; transvivas la plej adaptiĝemaj, la plej antaŭvidemaj je la senco de evoluo. Dum la sperto ne deklaras sian verdikton, ĉiu idealo estas respektinda, eĉ se tio ŝajnas absurda.

Kiam filozofo, saĝulo aŭ poeto eldiras idealojn, ilia tuja kompreniĝo estas ju pli malfacila, des pli

ili altiĝas super la antaŭjuĝoj kaj konvencioj de la medio. Akcepto ĝenerala estas facila, kiam ili akordiĝas kun malnovaj rutinoj; malfacila, kiam la imago ne metas originalecon en la konceptado aŭ formado.

La idealoj estas en ĉiama evoluo, kiel la formoj de la realo, kiun ili heroldas. La imago konstruas ilin observante la naturon, kiel rezultato de sperto; sed kiam ili estas formitaj, ili jam ne plu estas en ĝi, heroldas ĝin, vivas por anonci ĝian estontecon. Ne estas absoluta idealo : ĝi ĉiam rilatas al malperfekta nuna realeco. Aserti absolutecon signifus fornei ĝian esencon mem : la senfinan eblon perfektiĝi.

Tiu evoluado de la idealoj ne konservas uniforman ritmon dum la kuro de la vivo, ĉu socia ĉu individua. Ekzistas moralaj klimaksoj, horoj, momentoj, kiam tuta raso, popolo, klaso, partio, sekto, formas idealon kaj strebadas efektivigi ĝin. Same okazas en la evoluo de ĉiu aparta homo. Ankaŭ ekzistas momentoj, kiam la idealojn oni eldiras flustre, aŭ silentas pri ili : la realo prezentas kontentigojn tujajn al la deziroj, kaj la tento pri trosatiĝo sufokas ĉian emon perfektiĝi.

Sen idealoj, homa evoluo estus neklarigebla. En la evoluo de unuopuloj kaj popoloj ili estas lumturoj, kiuj prilumas la vojon de tempo al tempo. Kontraŭ tiuj heroldoj, rimarkeblas forto, kiu baras ĉiujn vojojn : trivialeco, aŭ nekapablo pri idealoj.

Tiel konceptita, konvenas restarigi idealismon en ĉiu estonteca scienca filozofio. Klare difinita, ĝi ĉiam estos privilegio de ĉiuj, kiuj honoras la homan specon pro siaj virtoj.

Al la dogma idealismo, kiun antikvaj metafizikistoj metis en siajn "ideojn" absolutajn kaj aprioriajn, ni kontraŭmetas idealismon eksperimentan, kiu rilatas al la "idealoj" pri perfektiĝo senĉese renoviĝantaj, plastikaj, evoluemaj kiel la vivo mem.

o o
o

## III. La temperamentoj idealistaj.

La homa perfektiĝo efektiviĝas laŭ diversaj ritmoj en socioj kaj individuoj. La plimulto havas sperton submetitan al la pasinteco : rutinoj, antaŭjuĝoj, servuteco. Malmultaj elituloj varias antaŭenirante al la estonteco, kun okuloj fiksitaj sur malproksimaj stelaroj ŝajne neatingeblaj. Tiuj homoj, pretaj emancipiĝi el sia grego, serĉante perfektiĝon trans la nuno, estas la "idealistoj".

La spiritoj ardantaj pro iu idealo estas kontraŭaj al la trivialeco. Ili estas io aŭ iu kontraŭ tiuj, kiuj estas nenio aŭ neniu. Ĉiu idealisto estas kvalitama homo : li posedas iun sencon pri la diferencoj, kiu permesas al li distingi inter la malbono, kiun li vidas kaj la plejbonon, kiun li imagas. La homoj sen idealoj estas kvantamaj : ili povas taksi la plion kaj la malplion, sed ili neniam distingas la bonon disde la malbono.

Nur la imagemuloj estas la parto viva kaj dinamika de la homaro; praktikaj homoj nur profitis de iliaj klopodoj, vegetante en la ombro. Pli faris la imago konstruante senripoze, ol la kalkulemo detruante senĉese. Sed Imago ne eliminas Sperton : ĉi-lasta estas utila, sed sen la alia ĝi estas senfrukta.

La homaro ne atingas, kien celas la idealistoj en ĉiu aparta perfektiĝo; sed ĉiam ĝi atingas pli malproksimen, ol kien ĝi estus trafinta sen ilia penado. Ĝi ne posedus siajn havaĵojn, se kelkaj idealistoj ne estus konkerintaj ilin vivante kun aspiro obseda pri la plejbono.

La juneco estas malkvieta. Impulson al la plejbono nur de ĝi ni rajtas esperi, ne de la rustaj kaj kadukaj. Ĝi rigardas antaŭen, ne malantaŭen, kaj laboras entuziasme por la estonteco. Oni ne povas esperi ion de la homoj, kiuj trapasas la vivon ne ardante pro idealo. Kaj oni ne naskiĝas juna : necesas akiri junecon; kaj sen idealoj oni ne povas akiri ĝin.

La idealistoj kutime estas ribelemaj kontraŭ la sociaj dogmoj, kiuj premas ilin. La konservativaj fortoj de la socia grundo penas kunmiksi unuopulojn,

senkapigante ilin; ili abomenas la diferencojn, malamas la esceptojn, anatemas tiun, kiu apartiĝas en serĉo de sia propra personeco. Tial ĉiu idealisto estas vivanta jesigo de la Individuismo, kvankam li celas socian ĥimeron; li povas vivi por la aliaj, neniam de la aliaj.

Instinkte ĉiu idealo estas troa; ĝi devas esti tia ĉar baldaŭ ĝi malkreskos spegulante sin ĉe la trivialeco de l'ceteraj. Antaŭ la hipokritulej, kiuj mensogas kun malaltaj celoj, la troigo de la idealistoj estas apenaŭe pasia vero. La pasio estas ĝia necesa karaktero, eĉ kiam ĝi ŝajne devojiĝas de la vero : ĝi kondukas al hiperbolo, eĉ al eraro, sed neniam al mensogo.

La sentimentala idealismo estas romantika : la idealoj vivas de sento. En la eksperimenta idealismo la ritmoj de la sentoj estas enreligitaj de la sperto, kaj la kritiko kunordigas la imagon : la idealoj fariĝas pripensemaj kaj serenaj. Unu estas juneca, kreskas, strebas, luktas; alia estas matura, radikiĝas, rezistas, venkas.

## IV. La romantika idealismo.

La romantikaj idealistoj estas troigemaj, ĉar ili estas nesatigeblaj. Ilia feliĉo estas marŝadi en direkto al la Idealo, ĉiam neatingita kaj neatingebla. Ilia scivolemo estas milokula; ilia sensiveco estas akra, plurobla, kaprica, artisma, kvazaŭ la nervoj estus centobligintaj sian senpersonecon. Ili konstruas siajn idealojn, tolerante nenion al la realo. Naivaj, kortuŝeblaj, inklinaj al tenero kaj entuziasmo, unu minuto sufiĉas al ili por decidi pri tuta vivo.

Ĉiu romantikulo estas por Donkiĥoto kontraŭ Sanĉo, por Cirano kontraŭ Tartufo; li preferas la floron ol la frukton, konjektante, ke ĉi-lasta neniam povus ekzisti sen tiu. La temperamentoj praktikemaj scias, ke la vivo gvidata de avido liveras materiajn profitojn; la romantikaj kredas, ke la plej alta deco naskiĝas el revo kaj pasio. Ilia elokventeco kuŝas en ilia

koro, ĉiam brula, ardanta foje; ili tiel skribas, kiel ili parolas.

La homo nekapabla flegi noblajn pasiojn vivas kaj mortas ne lerninte ami. Li abomenas la pasion profundan kaj koran; li malŝatas la sentimentalan romantikismon; li ne konas la sublimajn ecojn de la Amo, kiu estas revo, sopiro, danĝero, kaj ne besta kapturno de la sensoj.

En epoko, kiam apogeas trivialeco, la idealistoj viciĝas kontraŭ la sociaj dogmoj, kia ajn estas la reganta reĝimo. Foje en nomo de la politika romantikismo, ili agitas idealon demokratan kaj humanan.

En ĉio perfektigebla povas enesti io romantika. Kelkaj romantikuloj malkaŝas sin per konstrua mistikismo, kiel Furje' (Fourier) kaj Lamne' (Lamennais); en aliaj, kiel Bajron kaj Ruskin, la lirikismo tendencas fariĝi estetika religio. En Mazini kaj Kusut (Koussouth) ĝi prenas politikan nuancon; per buŝo de Lamartin' kaj Hugo ĝi parolas per tono profeta kaj transcenda; kaj en aliaj ĝi fariĝas ribelemo malĉenita kontraŭ ĉio, kio malpliigas kaj moligas la individuon, kiel en Emerson, Stirner, Guyau, Ibsen, Niĉe.

## V. La stoika idealismo.

La romantikajn ribelemojn malakriĝas la sperto. La lecionoj de la realo ne mortigas la idealiston : ili edukas lin. Kio antaŭe direktiĝis eksteren, tio polariziĝas en la propra strebado, eniĝas : "Granda viro - skribis Vinji' (Vigny) - estas idealo de la junaĝo efektivigita dum la maturaĝo".

La idealismo sentimentala kaj romantika transformiĝas je idealismo eksperimenta kaj stoika; la sperto reguligas la imagon kaj igas ĝin mezurema kaj pripensema. Romantikismoj ne rezistas la kritikan sperton : ili daŭras ĝis trans la limoj de la junaĝo, ilia ardo ne egalvaloras sian efikecon. Estis eraro de Cervantes la alta aĝo, en kiu Donkiĥoto entreprenas la ĉason de sia ĥimero. Pli logika estas Donĥuano, edziĝante je la sama aĝo, je kiu Kris-

to mortas. Kaj se la idealisto estas supera menso, lia idealo prenas definitivajn formojn : ĝi fariĝas klasika.

La stoika idealisto tenas sin malamike al sia medio, samkiel la romantika, en malkaŝa rezisto al la trivialeco organizita, en rezignacio spita aŭ sindonemo orgojla, senkompromise. Li akiras "individuistan sentemon", kiu ne estas vulgara egoismo nek indiferento pri la idealoj, kiuj agitas la socion, kie li vivas. Kiel sinteno, ĉiu individuismo estas ekribelo kontraŭ la dogmoj kaj falsaj valoroj respektataj en la mezaĉokratioj (°); ĝi neas eĉ la principon pri aŭtoritateco, evitas la antaŭjuĝojn, malrespektas ĉian trudemon, malŝatas la hierarkiojn nedependajn de la merito; partioj, sektoj kaj frakcioj ĉiuj egale estas al li indiferentaj, dum li ne trovas en ili idealojn akordantajn kun la siaj. Li kredas pli je la virtoj firmaj de la homoj, ol je la skribita mensogo de la teoriaj principoj.

Du moraloj esence malsamaj povas naskiĝi el la memestimo. La digna homo elektas la altan, tiun de Zenono aŭ Epikuro; la triviala homo ĉiam elektas la malaltan, tiun de Aristipo. Ĉi-lasta, kvar jarcentojn a.K. anoncis, ke la sola regulo de la vivo estas la plej granda plezuro, celata ĉiarimede, kvazaŭ la Naturo ordonus al la Homo la plenŝatiĝon de la sensoj kaj la foreston de idealoj.

Epikuro ekzaltas la plezuron en la menso, idealigas ĝin per la imago; laŭ li, ĝi devas esti elektita kaj dignigita per stampo de harmonio. La moralo de Epikuro estas rafiniteco : lia leĝo estis serĉi la feliĉon kaj eviti la doloron.

En alia helena moralo tamen, trovas sian kadron perfektan la idealismo eksperimenta : Zenono liveris al la homaro altegan doktrinon de heroa virto.

La stoika digneco havis apostolon : Epikteto. Konvinka elokventeco de sofismo bruligis lian parolon de ekssklavo. Li vivis kiel la plej humila homo,

---

(°) mezaĉokratio (N) = regado de la homoj mezaĉaj, trivialaj. (komp. : burokratio).

kontenta pri sia havaĵo, dormante en senpordaj domoj, dediĉita al meditado kaj edukado, ĝis kiam Romia dekreto proskribis la filozofojn.

Tiu ĉi moralo ne estas pasiva kontemplado, nek apatio nek inerteco; ĝi rezignas nur partopreni je la malbono. La stoikaj idealistoj estas homoj el sia raso : oni povus diri, ke ili ignoras la bonon, kiun ili faras al siaj propraj malamikoj.

Kiam kreskas la enmarĉiĝo de la submetitoj, kiam etoso de l'mezaĉokratioj iĝas pli sufoka, la epikuranoj kreas novan etoson moralan, semante idealojn : nova generacio plinobliĝas, lernante ami ilin. Kontraŭ la burĝaroj klopodantaj superi la nivelon de la materia bonstato, ili koncentrigas sian penadon por respektigi la spiritajn aferojn kaj la elstarajn originalecojn. La idealisma etiko transformas la valorojn kaj altigas la rangon de la merito : kontraŭ la komuna plateco, kiu tiras al vulgareco, la homoj kun digna karaktero plifirmigas fervore sian idealon. Ili kulturas profundajn deziregojn je perfekteco, kontraŭ senideala mezaĉokratio, kruda, skeptika, malkuraĝa.

## VI. Simbolo.

En la ir-reiro eterna de l'eraoj, la estonteco estas ĉiam de la antaŭvidemaj. La senfina batalo inter la idealismo kaj la trivialeco havas sian simbolon : Perseo (verko de Ĉelini) elmontranta la kapon de Meduzo, kies korpo reptilie baraktas sub ĝiaj piedoj flugilhavaj : vigliĝas la metalo kaj la lipoj ŝajnas elparoli percepteblajn vortojn; kaj ĝi diras al la junuloj, ke ĉia batalo pro idealo estas sankta, ke ĉian ĝermon de romantikismo oni devas kuraĝigi por girlandi per aŭrorbrilo la nuran printempon, kiu neniam revenas.

Kaj la maturulojn ĝi instigas gardi siajn idealojn per la plej rigora digneco.

o o o

# Ĉapitro 1 : la triviala homo

## I. Ĉu ora mezo ?

Sidante sur ŝtono, apud la vojo, la paŝtisto rigardas la naturon, kaj mutiĝas. Lia primitiva admiro estas simpla mirego. La poezio ĉirkaŭanta lin, speguliĝas en lia spirito, sed ne fariĝas poemo. Li estas apenaŭ objekto en la bildo, peniktuŝo : kiel la ŝtono, la arbo, la ŝafo, la vojo; akcidento en la duonombro. Por li ĉiuj aferoj estas ĉiam tiaj, kaj daŭre estos tiaj, ekde la grundo, kiun li tretas, ĝis la ŝafaro, kiun li paŝtas.

La grandega plimulto de la homoj pensas laŭ la kapo de tiu naiva paŝtisto : ĝi ne komprenus la eblon de homa perfektiĝo en la senĉesa adaptiĝado de la homo al la naturo.

Por koncepti perfektecon necesas ia etika nivelo kaj ia intelekta trejniĝo : sen ili oni povas havi fanatikecon kaj superstiĉojn; idealojn, ja neniam.

Kiuj vivas sub tiu nivelo, tiuj restas kroĉitaj al dogmoj, kiujn aliaj trudas al ili. Ili ne povas forĝi idealon al si; sektemaj ili estas. Kaj ili ne rimarkos eĉ la ironion de ĉiuj, kiuj invitas ilin kungregiĝi je nomo de idealoj, kiujn ili povas priservi, sed ja ne kompreni. La homa malegaleco ne estas moderna malkovro. Plutarko skribis antaŭ jarcentoj, ke "bestoj el la sama speco diferencas unu je la alia malpli, ol homoj inter si reciproke" (Moralaj Verkoj, Vol. 3).

Estas homoj mense malsuperaj al la meza nivelo de sia raso, sia epoko kaj sia socia klaso; ankaŭ estas aliaj superaj. Inter unuj kaj aliaj fluktuas granda amaso, kiun neeblas karakterizi per niveloj supera kaj malsupera.

Tiun amason psikologoj ne volis priatenti; la Arto malŝatas ĝin pro ĝia senkoloreco; la Historio ne konas la nomojn de ĝiaj anoj. Tamen estas natura kaj necesa ĝia ekzisto. Horacio ne diris : "aurea mediocritas" (latine : "ora mezo") en la senco ĝenerala kaj absurda, kiun proklamas tiuj nekapablaj el-

stari per sia sprito, siaj virtoj aŭ siaj verkoj. Metante sur trankvileco kaj sendependeco la plej grandan bonstaton de la homo, li laŭdis la ĝuojn de simpla ekzisto, egale malproksima de la lukso kaj de la mizero, kaj nomis tiun materialan mezon : "ora".

Kial elimini diferencojn inter la homoj kaj la ombroj, kvazaŭ malaltigante iomete la plej bonajn kaj polurante iomete la krudulojn, glatiĝus la malegalecoj kreitaj de la naturo ?

Ĉiuj malamikoj de la diferencoj estas ankaŭ tiaj rilate la progreson; ili konsideras originalecon kiel mankon nepardonindan. En la heterogeneco naskiĝas la toleremo de la rutinemuloj pri kiu ajn originala rebrilo; ili viciĝas por defendi sin, kvazaŭ diferencoj estus krimoj. La moroj kaj la leĝoj povas establi rajtojn kaj devojn komunajn al ĉiuj homoj; sed ĉi-lastaj estos ĉiam tiel malegalaj, kiel la ondoj, kiuj krispigas la surfacon de la oceano.

## II. La homoj sen personeco.

La personeco individua komenciĝas ĉe la preciza punkto, kie ĉiu diferenciĝas de la ceteraj. Tial, klasifikigante la homajn karakterojn, necesas apartigi tiujn, kiuj malhavas karakterizajn trajtojn : produktoj de la medio, de la cirkonstancoj, de la edukado, de la personoj, de la aferoj. La socio pensas kaj volas por ili. Ili ne havas voĉon, sed eĥon. Ili ŝteliras tra la mondo timante, ke iu riproĉos al ili tiun aŭdacon ekzisti vane, kiel kontrabandistoj de la vivo.

La vegetemaj ekzistaĵoj ne havas biografion : en la historio de la socio nur tiu vivas, kiu postlasas spurojn en la aferoj aŭ en la spiritoj. La vivo valoras laŭ la uzo, kiun ni faras el ĝi; laŭ la agoj, kiujn ni efektivigas.

Multaj naskiĝas, malmultaj vivas. La homoj sen personeco estas nenombreblaj kaj vegetas modlitaj de la medio, kiel vakso fandita de la socia formujo.

La homo fajnkaraktera kapablas montri sublimajn

ekkolerojn, kiel la oceano; ĉe la temperamentoj submetitaj ĉio ŝajnas kvieta surfaco, kiel en la marĉoj. Ilia manko de morala fortikeco cedigas ilin je la plej milda premo, suferigas al ili ĉiuspecajn influojn, flugigas ilin per la plej kvieta zefiro, renversas ilin per la malgranda ondo de rivereto.

Multaj mallertaj cerboj vantas je sia obstino, konfuzante paralizon kun firmeco. La friponoj fanfaronas pri sia senhonteco, erare prenante ĝin por sprito. Sentaŭguloj kaj lakeoj pavas pri sia honesteco, kvazaŭ oni povus iel konfuzi la nekapablon malbonagi kun la virto.

Ni studu, do, la malamikojn de ĉia perfekteco. La menskarenculo kaj la idioto; la genio kaj la talentulo, estas tamen esceptoj. La homo, kiu kutime svarmas ĉirkaŭ ni milope, kiu prosperas kaj multobliĝas en la silento kaj la mallumo, tiu estas la mezaĉa, la triviala.

Kiel la kadavrojn la profesoro eternigita de Rembrandt en "La anatomia leciono", kial ni ne sternas la homon senidealan sur nia nekropsia tablo, ĝis ni scios kio li estas, kiel li estas, kion li faras, pensas, por kio li taŭgas ?

## III. Pri la triviala homo.

La filozofio, la statistiko, la antropologio, la psikologio, la estetiko kaj la moralo kontribuis determini tipojn pli-malpli ekzaktajn; oni ne rimarkis tamen la valoron esence socian de la trivialeco.

Se ni povus mezuri la individuajn valorojn, ni rimarkus abundan amason da uloj akumuliĝantaj ĉe la centraj gradoj de la serio. Iluzio vana estus pretendi serĉi tie la hipotezan ĉeftipon de la homaro, la Homon Normalan, kiun jam serĉis Aristotelo. Tia Normala Homo ne ekzistas, ne povas ekzisti. La homaro evoluas senĉese; la homo normala en unu socio, ne estas tia en alia; tiu de antaŭ jarmilo ne estus tia hodiaŭ, nek en la estonteco.

La koncepto pri homa normaleco nur estus relativa al determinita socia medio : ĉu estus normalaj tiuj, kiuj viciĝas pli ĝuste en la rotoj de la sociaj kon-

vencioj ? En tiu senco, homo normala ne estus sinonimo de homo ekvilibrita, sed de Homo Submetita. Ĉu eblas konfuzi la grandajn ekvilibritojn : Leonardo, Gete, kun la senformuloj ?

La ekvilibro inter du pesiltasoj ŝarĝitaj ne estas komparebla al la senmoveco de malplena pesilo. La homo sen personeco ne estas modelo, sed ombro. Pri li, Hajne (Heine) donas tiun difinon : "Produkto de la kutimo, senigita je fantazio, ornamita de ĉiuj virtoj de la trivialeco, tenante honestan vivon dank'al la modero de siaj bezonoj, malrapida en siaj cerbumadoj, eltenanta per kortuŝa pacienco la tutan ŝarĝon de antaŭjuĝoj hereditan de siaj praulojʺ. Siavice, en "Aforismoj", Ŝopenhaŭer difinis la perfektan filistron kiel : "estulo, kiu lasas sin trompi de la ŝajnoj kaj prenas serioze ĉiujn sociajn dogmojn, konstante okupata submetiĝi je la mondumaj farsoj".

Al tiuj difinoj pri la triviala homo povas aldoniĝi aliaj el estetika aŭ intelekta speco. Ĉu li eble estas tiu, kiun en filozofio, en politiko aŭ en literaturo oni nomas ĝuste-meza ? Neniel, ĉar kiu estas ĝuste-meza scias tion, intencas esti tia; la triviala homo estas ĝuste-meza, kaj ne konjektas tion.

Lia karakteriza trajto estas lia bonvolemo je la opinio de la aliaj. Li parolas neniam, ripetas ĉiam. Li riverencus antaŭ sia plej kruela kontraŭulo, se ĉi-lasta leviĝus; li malŝatus sian plej bonan amikon, se neniu laŭdus lin.

Sed, tiuj difinoj ne estas certaj el la vidpunkto de la socia psikologio. Konvenas serĉi iun pli ekzaktan kaj seneraran, alirante la problemon tra aliaj vojoj.

## IV. Socia koncepto de trivialeco.

Malgraŭ la senfinaj diferencoj individuaj, ekzistas grupoj de homoj, kiujn oni povas kolekti en komunaj specoj; tiaj klasifikoj, simple proksimumaj, konsistigas la sciencon pri la homaj karakteroj, la Etologio.

Se ni observas kiun ajn homan socion, la valoro de ĝiaj partoj ĉiam rilatas al la tuto : la homo estas socia valoro. Ĉiu individuo estas la produkto de du faktoroj : la heredo, kiu provizas lin per la organoj kaj la mensaj funkcioj, kiujn transdonis al li la antaŭaj generacioj kaj la edukado, kiu estas la rezulto de la multoblaj influoj de la socia medio, kie li estas devigata vivi.

La infano elkreskas kiel animalo el la homa specio ĝis li komencas distingi la inertajn objektojn disde la vivajn estulojn kaj rekoni inter ĉi-lastaj siajn similulojn. Ĉar superregas la influo de la medio, li evoluas kiel membro de sia socio kaj liaj moroj organiziĝas per la imitado.

La malsama adaptiĝo de ĉiu individuo al sia medio dependas de la ekvilibro inter tio, kion li imitas kaj tio, kion li inventas.

La superrego de la variado determinas la originalecon. Varii estas diferenciĝi, havi propran karakteron, ne vivi kiel nura spegulo de la ceteraj. La ĉefa funkcio de la triviala homo estas la imitiva pacienco; tiu de la supera homo estas la kreiva imago.

Resume : tri elementoj kontribuas formi la personecon de ĉiu homo rilate sian medion : la biologia heredo, la socia imitado kaj la individua variado.

La malsupera homo estas homa besto : lia malkapablo por la imitado malhelpas lin adaptiĝi je la socia medio, kie li vivas. Tiu nesufiĉa adaptiĝado determinas lian nepovon pensi kiel la ceteraj kaj partopreni la komunajn rutinojn.

La triviala homo estas esence imitema kaj perfekte adaptiĝas je la grega vivado, ripetante la rutinojn, antaŭjuĝojn kaj dogmojn akceptitajn kiel utilajn por la submetiĝo.

La supera homo estas originala kaj imagema, maladaptiĝanta je la socia medio laŭ sia propra variado. Li heroldas novajn perfektigajn manierojn kaj povas trudi idealojn siajn al la rutinoj de la ceteraj.

o o
o

V. La konservativa spirito.

Ĉio, kio ekzistas, estas necesa. La trivialulo reprezentas progreson, en komparo kun la kreteno. Se li estus esence senutila, li ne ekzistus : la natura selektado estus eksterminta lin.

Ĉiuj homoj kun firma personeco staras malamike kontraŭ la trivialeco. Antaŭvidantoj de novaj veroj rigardas ĝin kiel baron, per kiu la pasinteco malhelpas la alvenon de ilia renoviga laboro. Antaŭ la socia moralo, tamen, la trivialuloj trovas pravigon kiel ĉio, kio ekzistas pro neceso.

Laŭ Dorado, hispana pensulo, ne eblas senmova vivo de homoj ĉiuj konservativaj, sed ankaŭ ne malkvieta svarmo de ribeluloj kaj kontraŭstarantoj. Verŝajne ambaŭ fortoj estas nepre necesaj. La originaleco bezonas fortan kontraŭpezon, kiu preventas ĝiajn troigojn. Samkiel en la organismoj, la diferencaj elementoj sociaj apogas unu la alian. Se en la mondo estus nur ribeluloj, ĝi ne povus funkcii; neebliĝus ribelemo se mankus tiuj, kontraŭ kiuj ekribeli. Ĉu tiuj trafas, kiuj elĉerpas la sukon de la vivo, ne dediĉante eĉ unu horon al sia propra morala perfektiĝo, kaj ne zorgante pri siaj proksimuloj ? Ĉu eble pekas la homoj sindonemaj, altruistaj, kiuj oferas siajn ĝuojn kaj fortojn pro alies bono ?

Kvankam nepre necesas pensi pri la morgaŭo kaj dediĉi al ĝi iomon el niaj klopodoj, neeblas vivi en la nuno, ne pensante pri ĝi, eĉ parte.

Tiu rezonado estus respektinda, se ni metus la problemon sur la abstraktan kampon de la homo ekstersocia. La homo originala kaj la rutinema, la maldiligenta kaj la laborema, la bona kaj la malbona, la malavara kaj la avara, ĉiuj estas tiaj malgraŭ si mem; ili ne estus tiaj, se la ekvilibro inter ilia temperamento kaj la socio ne malhelpus tion.

Kial do la homaro admiras la sanktulojn, la geniulojn, la heroojn, la inventistojn, instruistojn, kreistojn ? Ilin ĝi aplaŭdas, ĉar la socio implicite havas moralon, valortabelon por taksi ĉiun el siaj anoj, laŭ lia socia utileco.

La konservativa imitemo devas do esti juĝata laŭ

sia funkcio de rezistado kontraŭ la kreiva impulso de la superaj homoj kaj la detruemaj tendencoj de la kontraŭsociaj uloj.

La idealoj de la superaj homoj restus en ĥimera stato, se ili ne estus adaptitaj kaj efektivigitaj de filistroj, kiuj vivadas atendante la sugestojn de la lumoj. La inerteco mem de la rutinemuloj garantias, ke ili prenas nur la ideojn sufiĉe konvenajn por la socia bonstato. Ilia granda kulpo konsistas en tio, ke ilia nombro estas ega. Malgraŭ ĉio, ili estas bezonataj; ili konsistigas la publikon de tiu homa komedio, en kiu la superaj homoj puŝas al la planklumoj, serĉante ilian aplaŭdon kaj ilian praviĝon. Rigardataj individue tra la morala estetika lenso, ili aperas kiel negativaj estaĵoj, sed prenitaj en sia tuto la trivialuloj havas balastajn funkciojn, nepre necesajn por la ekvilibro de la socio.

La trivialulo inventas nenion, ne kreas, ne puŝas, ne rompas, ne elpensas; sed kontraŭe li gardas fervore la muntaĵon de la aŭtomatecoj, antaŭjuĝoj kaj dogmoj amasigitaj dum jarcentoj, defendante tiun komunan kapitalon kontraŭ la insido de la homoj neadaptiĝemaj. La senidealaj homoj ludas en la homa historio la saman rolon kiel la heredo en la biologia evoluo : ili konservas kaj transdonas la variojn utilajn por la daŭrigo de la socia grupo. La kohero de ĉi-lasta bezonas ilin, kiel bizanca mozaiko la cementon, kiu ĝin algluas, sed la cemento ne estas la mozaiko.

Sen la trivialuloj ne estus stabileco en la socioj; sed sen la superaj homoj ne estas pensebla la progreso, ĉar la civilizacio estus neklarigebla en raso konsistanta nur el homoj sen iniciatemo.

La rutinoj defendataj hodiaŭ de la trivialuloj estas simplaj, kolektivaj glosoj de idealoj, elpensitaj hieraŭ de originalaj homoj. Kio estis hieraŭ idealo kontraŭ rutino, tio estos morgaŭ rutino kontraŭ alia idealo; senĉese, ĉar perfektiĝeblo estas senfina.

La idealistoj kaj la rutinemuloj estas faktoroj nepraj en la evoluo socia, kvankam unuj malfidas je la aliaj.

VI. Sociaj danĝeroj de la trivialeco.

La trivialaj homoj estas rutinemaj, honestaj kaj mildaj. Ili estas blindaj je la aŭroroj; ili ne konas la ĥimeron de la artisto, la revon de la saĝulo kaj la pasion de la apostolo. Nenio spronas ilian scivolemon; ili malhavas iniciatemon kaj rigardas ĉiam al la pasinteco, kvazaŭ ili havus la okulojn ĉe la nuko.

Ili ne vibras je la tensioj plej altaj de la energio; ili estas malvarmaj, kvankam ili ne konas la serenecon; apatiaj, ne estante antaŭvidemaj; ĉiam artifikemaj, neniam ekvilibritaj. Ili malhavas kondutvojon. Ili ŝanĝas sian honoron por donaco; ili ŝlosas sian dignecon por eviti danĝeron; ili rezignus la vivon, anstataŭ ol elkrii la veron kontraŭ la eraro de multaj. Kiam ili gregiĝas, ili estas danĝeraj. Ili fortiĝas en la kohera tuto, kiu estas malutila en iuj momentoj de l'historio : kiam regas etoso de trivialeco. Kiam la socia ekvilibro rompiĝas je ilia favoro, la homoj komfortamaj havas sian floran printempon. Mezaĉokratioj fariĝas la Ŝtatoj : ili establas reĝimon, kiu renversas la tabelon de la moralaj valoroj, falsante konceptojn : pensi estas frenezo, estas lirikismo la justeco, sincereco estas stulto, virto estas malsaĝo.

La dogmemuloj kaj la lakeoj akrigas la silogismojn por falsi la valorojn en la socia konscienco : ili vivas en la mensogo, manĝas el ĝi, semas ĝin, akvumas ĝin, rikoltas ĝin, kreante mondon de fiktivaj valoroj, kiu favoras la sukceson de la malspritulo.

Neniu idealismo estas respektata. Se la destino alvokus genion, sanktulon aŭ heroon por rekonstrui rason aŭ popolon, la mezaĉokratioj spontanee kolektiĝantaj forrezistus ĝin, por emfazi siajn proprajn ĉeftipojn. Ĉiu idealismo trovus en tiu etoso sian Tribunalon de la Inkvizicio.

VII. La vulgareco.

La homoj vulgariĝas, kiam reaperas en ilia karaktero tio, kio estis trivialeco en la prageneracioj. La vulgareco estas pligraviĝo de la stigmatoj komunaj al

ĉiuj gregemaj estuloj; ĝi floras nur kiam la socioj malekvilibriĝas malfavore al la idealismo.

Loza estas ĝia grimaco, muta ĝia parolo, senluma ĝia rigardo. Ne konas ĝi la parfumon de la floro, la trembrilon de la steloj, la gracion de la rideto, la murmuron de la flugiloj. Maloportune ĝi eksplodas en la parolo aŭ la gesto. Senkolora, surda, blinda, nesentema, ĝi sieĝas kaj spionas nin; ĝi plezuriĝas en la groteska, vivas en la marĉoj, moviĝas en la ombroj. Ĝi estas nekapablo pensi kaj ami, malŝparo de la vivo.

La vulgaraj homoj estas ĉie, kiam reintensiĝas trivialeco : en la purpuro kaj en la ruboj, en la avenuo kaj en la suburbo, en la parlamentoj kaj en la karceroj, en la universitatoj kaj en la staloj. Ili abomenas lirikajn aferojn, ĉar tiuj postulas tre altajn pensojn, kaj tro dignajn trajtojn. Ili estas netaŭgaj pri stoikismo. Ilia malavaro estas ĉiam mono pruntedonita uzure. Ilia amikeco estas servaĉa komplezemo aŭ profitcela flato.

Ili admiras la utilismon egoistan, tujan, podetalan, kontantan. La penso ne fekundigita de pasio estas kiel la vintraj sunoj : ili donas lumon, sed sub iliaj radioj oni povas morti frostigita. La vulgareco estas glacia vento, kiu frostigas ĉiun ĝermon de poezio, kiu povas beligi la vivon. La vivĝojon ĝi transformas je timo, la prudenton je malkuraĝo, la fieron je vanteco, la respekton je vasaliĝo. Ĝi kondukas al la pavado, al la avareco, al la malvero, al la avido, al la ŝajnigo.

La trivialeco estas la kompleksa valoro de la socioj, la rezisto kiun ĉi-lastaj kontraŭmetas al la vento por utiligi ĝian forton. La energio, kiu ŝveligas la velojn kaj tiras la tutan ŝipon, kaj kondukas ĝin kaj orientas ĝin, estas la idealistoj, ĉiam kontraŭataj. Tiel, rezistante al ili, samkiel la velaro la venton, la rutinemuloj profitas la impulson de la kreantoj. La homa progreso estas la rezultato de tiu ĉiama kontrasto inter inertaj masoj kaj impulsaj energioj.

Ĉapitro 2 :

# La intelekta trivialeco

I. La rutinema homo.

La Rutino ne estas ido de la Sperto; ĝi estas ĝia karikaturo. La trivialaj spiritoj rondiras en ĝia orbito. Ili ripetas, ke estas preferinda la malbono konata, ol la bono konota. Kutimaj zorge kopii la antaŭjuĝojn de sia medio, ili senkontrole akceptas la ideojn distilitajn en la socia laboratorio.

La rutinemuloj kutimiĝis rezigni la pensadon. En ili, ĉio estas minimuma peno : senaktiveco rustigas ilian inteligenton.

La kutimoj akiritaj de la originalaj homoj estas propre iliaj : ili konsistigas ilian kriterion, kiam ili pensas, kaj ilian karakteron, kiam ili agas; ili estas individuaj kaj netransdoneblaj. Ili substance diferencas de la rutino, kiu estas kolektiva kaj ĉiam malutila, ekstera al la individuo, komuna al la grego : ĝi konsistas el infektiĝo je la antaŭjuĝoj, kiuj koruptas alies kapojn. La oficiala edukado enhavas tiun danĝeron :. ĝi intencas forviŝi ĉian originalecon metante samajn antaŭjuĝojn en malsamajn cerbojn. Pli infekta estas la trivialeco, ol la talento.

La rutinuloj rezonas per la logiko de la aliaj. Ili estas flekseblaj sub la pezo de la publika opinio, kiu platigas ilin kiel senindulga laminatilo.

Ili estas krudaj, ne konsiderante sin malfeliĉaj pro tio. Aŭdante ilin paroli unu horon, oni havas la impreson, ke ĝi havas mil minutojn. La nesciado faras ilin instrumentoj de ĉiuj fanatikismoj kaj submetiĝoj. Ili malhavas bonan guston kaj kapablon ĝin akiri. Ili ne intencas studi; ili neas, ke la kulturo estas la plej profunda fonto de virto. La legado estigas al ili venenajn efikojn : ili englutas sen digesti, ne sciante, ke la homo ne vivas de englutado sed de asimilado. Ili ŝtopas sian cerbon per almanakaj proverboj, kaj revivigas ilin de tempo al

tempo, kvazaŭ ili estus sentencoj. Ili nomas siajn zorgojn, idealoj, ne konsiderante, ke ili estas nura rutino enskatoligita, parodioj de racio, opinioj senprudentaj.

Ili estas prozaj; la manko de idealoj malhelpas al ili meti en siajn agojn la fingringon de salo, kiu poeziigas la vivon.

Sanĉo-Panza (ŝildisto de Donkiĥoto) estas la perfekta enkorpiĝo de la plej indaj proporcioj de stulteco, egoismo kaj sano. Hispanaj apologiistoj de krudulo Panza kontraŭmetas lian malnoblan praktikan komprenon, kontraŭ la ĥimeraj revoj de la kavaliro. Ĉu ne distingi, ke unu havas idealojn kaj la aliaj avidojn; unu dignecon kaj alia servaĉemon; unu originalajn delirojn kaj la alia kredojn absurdajn imititajn el alies kapoj ? Kontraŭ ĉiu forĝisto de idealoj viciĝas sentime mil Sanĉoj, kvazaŭ por bari la veron, devus komploti ĉiuj hordoj de la stulteco.

La rebrilo de la originaleco blindigas la rutineman homon. Li forfuĝas el la flugilhavaj pensuloj, timante ebriiĝi per la parfumo de ilia stilo. Se li povus, li proskribus ilin amase, restarigante Inkvizicion aŭ Teroron.

Ĉiuj rutinuloj estas netoleremaj. Ili defendas la anakronismon kaj la absurdon. Ili nomas herezulo tiun kiu defendas veron : ili bruligas Brunon kaj Servet-on, senkapigas Lavŭazieron (Lavoisier) kaj Ŝenjeron (Chénier). Kiu multe penadis por formi siajn kredojn, tiu aprezas en la aliaj meriton, kies prezon li konas.

La rutinemuloj antaŭsentas danĝeron en ĉiu nova ideo. Ili preferas silenton kaj inertecon. Iliaj cerboj estas gastejoj, sed senmastraj; la ceteraj pensas por ili, kiuj dankas tiun favoron en sia interno. Ili komunias de ĉiuj altaroj, prilaborante nekongruajn kredojn. Ili ne konjektas, ke la dubo de la supera homo estis ĉiam alispeca, antaŭ ol tion klarigis Kartezio : ĝi estas dezirego korekti la proprajn erarojn ĝis la kompreno, ke ĉiu opinio estas mankohava kaj ĉiu idealo perfektigebla. La rutinuloj kontraŭe ne korektiĝas nek konvinkiĝas iam; iliaj antaŭjuĝoj estas kiel la najloj : ju pli frapataj, des pli ili eniĝas.

Ili enuas je la verkistoj, kiuj postlasas stampon; ili preferas la senkolorajn cerbumaĵojn de aŭtoroj senreliefaj, kiuj transformas vulgaraĵojn pere de barokaj adjektivoj.

Ili vivas nevivsimilan vivon. Ili kreskas kaj mortas kiel la plantoj. Ili ne bezonas esti scivolemaj nek observemaj. Ili estas prudentaj, kun malesperiga prudento : se iu el ili preterpasus la klinan turon de Pisa, li malproksimiĝus kun timo esti frakasata. La homo originala, nesingarda, haltas rigardadi ĝin; genio atingas pli foren : li surgrimpas la kampanilon, observas, meditas, provas, ĝis li malkovras la leĝojn plej altajn de la Fiziko : Galileo.

La vulgaraj personoj pasigas la tutan vivon rigardante la lunon supre de ĝia loko, ne demandante al si, kial ĝi estas ĉiam tie, ne falante. Nur la saĝa homo, t.e. homo originala aŭ genio, Neŭton, kuraĝas malkonfidi je la rutino, kaj konjektas ion similan inter la pala lampo pendanta en la ĉielo kaj la pomo, kiu falas el la arbo lulata de la vento. Neniu rutinulo estus malkovrinta, ke sama forto turnas la lunon supren kaj faligas la pomon malsupren.

En tiuj homoj, imunaj al la pasio je la vero, ne enestas impulsoj por perfektiĝo. Iliaj mensoj estas kiel mortaj akvoj, kie svarmas malutilaj ĝermoj, kiuj finfine malkomponiĝas. La teroj fekundaj nekultivitaj kovritaj de fiherboj; la rutinemaj spiritoj pleniĝas de antaŭjuĝoj, kiuj sklavigas ilin.

## II. La stampoj de la intelekta trivialeco.

En la vera triviala homo la kapo estas nura ornamo de la korpo. Se li aŭdas nin diri, ke ĝi taŭgas por pensi, li kredas, ke ni estas frenezaj. Li malhavas akrevidon pri divenado; li estas kondamnita ne penetri la aferojn aŭ la personojn. Lia stulteco estas seninterrompa. Li estas solena; li akompanas per molaĉa retoriko la agojn mimikajn, kaj prononcas vortojn sensubstancajn, kvazaŭ la tuta Homaro volus aŭdi ilin.

Li faras nenion por indigi sian veran memon, penante nur ŝveligi sian socian fantomon. Li abomenas la ridon, timante, ke la gaso eliros tra la lipoj kaj la balono malŝvelos.

Lia mensa miopeco malhelpas lin kompreni la plej altan ekvilibron inter eleganto kaj forto, inter belo kaj saĝo. Kie li kredas eltrovi la gracion de la korpo, la facilon, la lerton, la flekseblon, li malakceptas la ecojn animajn.

Li imagas Platonon kaj Aristotelon kiel personojn gravmienajn kaj seriozajn. Ili skribis siajn traktatojn pri politiko por distriĝi kaj amuziĝi; tiu estis la malplej filozofia parto el ilia vivo; la plej filozofia estis vivadi simple kaj trankvile. La triviala homo, kiu rezignus sian solenecon, delokiĝus : li ne povus vivi.

Modesteco li nomas la malpermeson al la genioj, sanktuloj kaj herooj proklami siajn naturajn rajtojn. La solaj viktimoj de tiu falsa virto estas la bonegaj homoj, devigataj ne palpebrumi dum la enviuloj makulas ilian gloron.

Gete sentencis : "Nur la friponoj estas modestaj". Oni supozas, ke la modestulo neniam pretendas esti originala, nek laŭtigas sian parolon, nek havas opiniojn danĝerajn, nek malaprobas la registojn, nek sakras pri la sociaj dogmoj : la homo, kiu akceptas tiun maskon hipokritan, rezignas vivi pli ol tion, kion liaj kunkulpuloj permesas. Ekzistas alia modesteco, virto pura : simpla respekto al si mem kaj al ceteraj.

Tiuj homoj estas raraj; komparataj al la malveraj modestuloj, ili estas trifolioj kun kvar folioj. Ekzistas fiaskintoj, kiuj rezignacie toleras modestecon por komplezi al la mezaĉokratioj, kiuj povas transformi ilin je funkciuloj; kaj ili estas trivialaj, kun la kataplasmo de la modesteco sur la ulcero de ilia trivialeco. Kiel La-Brujer' (La Bruyère) sentencis : "La malvera modesteco estas la lasta rafiniteco de la vanto".

Timante pensi, kvazaŭ tio estus la plej granda el la sep ĉefpekoj, ili perdas la kapablon por kiu ajn opinio; tial, kiam trivialulo estas juĝisto, li submetiĝas al la rutino, neniam administras justecon, kaj

ofte implikas ĝin.

La timo kompromiti sin kondukas ilin simpatii kun singarda skeptikismo. Timante juĝi laŭ propra kriterio, ili opinias sin devigataj dubi pri la junuloj; tio ne malhelpas ilin diri post la venko, ke ili estas eltrovintaj ilin. Tiam ili disdonas ĵurojn pri sklaveco, nomante ilin kuraĝigaj vortoj : omaĝo al sia nekonfesebla timego.

Ili malutilas pro neantaŭvidemo aŭ pro senkonscio. Ili perfidas pro neglektemo. Ili kompromitas pro distremo. Ili ne kapablas gardi dekreton : tio estus kvazaŭ kaŝi trezoron en vitra skatolo. Ilia plej granda sprito estas ĉiam buŝa, kaj ili nur atingas la vortoĵongladon; ili tremas ĉe la manipulantoj de ideoj, kiuj produktas tiun spiritan frukton : la paradokson.

La intelekta trivialeco igas la homon solena, modesta, hezitema kaj malsprita. Li kuriĝas siajn okulojn tra la ebenoj; li evitas gvati desur la suproj, kiujn suprengrimpas la antaŭvidemuloj kaj alrigardi la abismojn, kiujn trasondas la elitoj.

## III. La malicaj buŝoj.

Se ili limigus sin vegeti, la senidealaj homoj estus liberaj je riproĉoj kaj laŭdoj. Oni ne kulpas, se oni ne naskiĝis kun eksterordinaraj kvalitoj. La trivialuloj meritus tiun afablan toleremon, dum ili tenus sin kaŝitaj. Bedaŭrinde, ili kutimas forgesi sian malsuperan rangon kaj pretendas ludi la fluton, por ke la aliaj marŝu laŭtakte de iliaj malagordoj.

Ili dente disŝiras ĉiun reputacion, kiu humiligas ilin, ne suspektante, ke tiu estas la plej malnobla homa konduto. Tiu trajto distingas la submetiton disde la dignulo, la hipokritulon disde la virtulo, la kanajlon disde la kavaliro. La lakeoj povas rampi sur la famo; la plej indaj homoj ne kapablas veneni alies vivon.

La profunda elokventeco de la fama pentraĵo far Sandro Botiĉeli : "La Kalumnio" invitas mediti kun dolora enmemiĝo : Malkuraĝa pro la maldeca gesto

de la Kalumnio, la Senkulpulo kuŝas en la centro de la bildo. La Envio ĝin antaŭas; la Trompo kaj la Hipokrito ĝin akompanas. Ĉiuj malnoblaj kaj perfidaj pasioj aliĝas kun senindulga klopodo por la venko de la malbono. La Pento oblikve rigardas al la kontraŭa flanko, kie estas kiel ĉiam sola kaj nuda, la Vero. Ĉi-lasta levas sian montrofingron al la ĉielo trankvile sin turnante al la dia justeco, kontrastante kun la sovaĝa festo de ĝiaj malamikoj. Kaj dum la viktimo unuigas siajn manojn kaj etendas ilin al ĝi kun petego senfina kaj kortuŝa, juĝisto Midaso liveras siajn vastajn orelojn al la Nesciado kaj la Suspektemo.

La trivialuloj, pli inklinaj al la hipokrito, ol al la malamo, preferas la klaĉon obtuzan anstataŭ la perfortan kalumnion. Ĉi-lasta estas riska kaj riskoplena, la unua estas kaŝa kaj subtila. La kalumniulo defias la punon; la klaĉemulo ĝin evitas, ŝirmas sin per la kompliceco de siaj egaluloj.

La klaĉemuloj floras kie ajn : en la salonoj, en la kluboj, en la akademioj, en la familioj, en la profesioj, persekutante ĉiujn, kiuj reliefigas ian originalecon.

Ili parolas flustre, singarde, en penado konstanta difekti la feliĉon de la aliaj semante plenmane la semon de ĉiuj fiherboj. La kalumnio estas serpento, kiu enŝteliĝas en la konversacio de la malnobluloj.

La malpuraĵon ili verŝas en ĉiujn pokalojn, serene kiel Borĝa, per manoj lertaj, afablaj, kvazaŭ ĵonglistaj. La klaĉemulo, malkuraĝa inter ĉiuj venenistoj, estas sekura pri la senpuneco; pro tio, li estas malŝatinda. Li ne asertas, sed subkomprenigas; li mensogas tiel spontanee, kiel li spiras. Nenion li respektas, eĉ ne la intimajn virtojn nek la hejmsekretojn.

Sen malkuraĝo, ne ekzistas klaĉoj : necesas tremi ĉe la ideo de la ebla puno kaj kovri sin per la maskoj malplej suspektindaj. Se tiuj parolantaj baziliskoj posedas ian glazuran tavolon da kulturo, ili pretendas kaŝi sian malnoblon per la mantelo de la sprito. Per la ekzercado ili povas lertiĝi pri sia mokema malico, sed ĉi-lasta ne konfuziĝas kun la sagaca kaj trafa ironio, kiu estas la perfektiĝo de la sprito,

kunfluo de propono kaj rideto, subtila en la oportuneco kaj ĝusta en la mezuro.

Pli facile estas al la triviala homo ridindigi subliman agon, ol imiti ĝin. Tiuj serpentoj estas perverse malicaj pro sia manko de nobleco. La liliputaj kalumniantoj estas pli teruraj, ol la forto de la molekuloj, kiujn neniu vidas, kaj kiuj korodas la plej bonajn metalojn. La triviala verkisto timeme ungogratas tiujn, kiujn li envias. Multaj el la malbonaj verkistoj limigas sin esti terure enuigaj. En iliaj paĝoj svarmas la papagaĵoj, kiel la ekzercoj de la multlingvaj gvidlibroj. Ili priskribas stumblante kun la realo; ili malesperas pensante, ke la paŭsado ne apartenas al la belartoj. Se ili atakas la literaturon, oni povus diri, ke Vasko-da-Gama entreprenas la malkovron de ĉiuj komunaj lokoj, ne ekvidante la Kabon de Bona Espero; se ili plaŭdas en la scienco, ili paŝas kiel montara mulo. Tiuj adorantoj de la rapsodio kaj la parafrazo praktikas tiun honteman modestecon, kiu estas ilia konvencia mensogo; ili admiras unu la alian, kun solidareco de loĝio, abomenante ĉian blovegon de ciklono aŭ flugilbaton de aglo. La trivialaj verkistoj, timemaj kaj singardaj, estas sendanĝeraj. Nur envio povas fervorigi ilin : tiuokaze ili preferas fariĝi recenzistoj.

La parolanta trivialulo estas pli malbona pro sia moralo, ol pro sia stilo. La buŝa klaĉemo havas efikojn tujajn, teruregajn. Rakontante pri pekoj de aliaj, li uzas sian memamon por aspekti interesa, grandigante ilin, ornamante ilin, transirante senrimarke de la vero al la mensogo, de la krudeco al la malnoblo, de la klaĉo al la kalumnio. La efiko de la senkreditigo radikas en la neesprimita kontento de la aŭskultantoj, en la kolektiva malkuraĝo de ĉiuj, kiuj povas aŭskulti ĝin ne indignante : ĝi mortus, se ili ne kreus vivdonan etoson al ĝi.

## IV. La vojo al la gloro.

La triviala homo havas urĝajn avidojn : sukceson. Li ne suspektas, ke ekzistas alia afero, la gloro, kiun ambicias nur la superaj karakteroj. Sukceso es-

tas venko efemera, kontanta; gloro estas definitiva, nevelkebla dum jarcentoj. La unuan oni almozpetas, la lastan oni konkeras.

Ĉiu kortegano de la mezaĉokratio triumfas humilige, rampe, ŝtelire, ombre, maskite. La meritplena homo trudiĝas mastre, lume, vipe, plenaere, senmaske, sendekliniĝe.

La vanteco pelas la homon vulgaran ĉasi postenon rimarkindan en la Ŝtatadministracio. La homo altekvalita kapablas rezigni ĉiun oficon, kies prezo estas parteto de lia digneco. La genio rondiras en propra orbito, ne atendante fiktivajn sankciojn el politika, akademia aŭ monduma speco; li distingiĝas pro la ĉiameco de sia disradiado, kvazaŭ lia vivo estus vivdaŭra tagiĝo.

Kiu senmerite akiras favorojn, tiu devas tremi : li poste malsukcesas centfoje, ĉe ĉiu ventŝanĝiĝo. La noblaj kapoj konfidas nur je si mem : ili elektas siajn proprajn vojojn.

La sukceso estas la alkoholo de la batalantoj. La unuan fojon ĝi ebriigas : poste ĝi fariĝas nepra neceso. Rigardi ĝin alvizaĝe estas elmontriĝi al abismo : oni retroiras ĝustatempe aŭ falas en ĝin por ĉiam. Nemeritita ĝi estas puno, veneno de la vanto.

La supera homo, kontraŭe, akceptas kiel simplan anticipon de la gloro tiun etan tributon de la trivialeco, vasalo de liaj meritoj.

Pro neatendita akcidento ĝi naskiĝas; tra nevideblaj padoj ĝi alvenas. Laŭ la paso de la tempo, neebliĝas vivi sen la vivdona veneno. Por la homo artifikema estas absoluta certeco : liaj sukcesoj estas iluziaj kaj fuĝemaj, eĉ se tre humilige estis atingi ilin. Ne sciante, ke la spirita arbo donas fruktojn, li zorgas rikolti la sekajn foliojn.

La grandaj cerboj supreniras ekskluzive laŭ la vojo de la merito, aŭ laŭ neniu : la gloro dependas nur de ili.

La sukceso estas bonfara : ĝi ekzaltas la personecon, forigas la envion, fajlas la raspecon de la karaktero, oleas la koron.

La famo kutime liveras la nedaŭran iluzion de la gloro. De ĉi-lasta ĝi estas la formo falsa, surogata, neprofunda, fuĝema; la malvera gemo, la straso, la artfajraĵo.

La gloro estas malrapida, sed daŭra. La intenseco egalas la sukceson, kaj estas inverse proporcia al la daŭro, kiu egalas la gloron.

En la vivo oni estas aktoro aŭ publiko, stiristo aŭ remisto. Tiel dolore estas pasi de la stirilo al la remo, kiel de la scenejo al la fotelo, eĉ se unuavica.

La publiko fluktuas laŭ la modo; la korpo eluziĝas. La famo de oratoro, skermisto aŭ aktoro daŭras nur tiel longe, kiel ilia junaĝo. Por tiuj sporadaj sukcesintoj, ĉar la vivon oni mezuras laŭ la feliĉaj horoj, konvenus adiaŭi ĝin ridetante, kun la sensaco, ke oni meritis elvivi ĝin ĝis la lasta spiro.

La famo kaj la konateco ne estas la gloro : nenio pli mensoga, ol la sankcio de la samtempuloj kaj la homamasoj.

Genioj, sanktuloj kaj herooj malŝatas submetiĝon al la nuno, kun la pruo en direkto al fora idealo : ili estas ĉeftipoj de la Historio.

o o
o

Ĉapitro 3 :

# La moralaj valoroj

I. La moralo de Tartufo.

Hipokriteco estas la arto ŝtopi la buŝon de la digneco. Ĝi fekundigas la vulgarajn temperamentojn, kiuj prosperas en la mensogo, kiel tiuj branĉoplenaj arboj, kiuj kreskas najbare de la marĉoj.

La homoj malnobligitaj de la hipokriteco vivas sen revoj. Ili intime estas certaj, ke ili agas maldece, hontinde; pro tio estas netaŭga ilia moralo, kiu ĉiam implicas ŝajnigon.

Nenia fido impulsas la hipokritulojn. Ili evitas la respondecon pri siaj agoj; ili estas aŭdacaj dum

la perfido kaj timemaj dum la lojaleco. Ili ŝtopas ĉiujn fendetojn de sia spirito, tra kiuj povus elmontriĝi ilia personeco nude, sen la vestaĵo socia de la mensogo.

Kiel la mallarĝaj mensoj imitas mimetisme la intelektan talenton, tiel la individuoj kun dubinda moralo travestias la moralan talenton, tegante per strasa virto sian sengustan honestecon.

La hipokritulo akiras avantaĝon per sia ŝajnigita virto; li estas respektata pro sia sinkaŝado sub la masko. Li ne retroiras ĉe la ruzaĵoj; li scipovas priflari la volon de la mastroj; li prosperas pere de trompoj. La lojala homo ofte estas lia viktimo : ĉiu Kristo renkontas sian Judason.

Li kapablas je ĉiaj abomenoj. Li persekutas la superajn karakterojn, pretendante konfuzi iliajn meritojn kun la propraj trivialecoj. Li disvolvas obtuze sian envion en la duonombro, mensogante pri aliĝo kaj amo al la samaj personoj, kiujn li abomenas kaj ronĝas.

La malamo estas laŭdinda, se ni komparas ĝin kun la hipokriteco. Tiel distingiĝas la kaŝa timemo de la hipokritulo disde la diamanta lojaleco de la digna homo.

La hipokritulo flegas la plej profitigajn kredojn. Li preferas tiujn, kiuj asertas la ekziston de la purgatorio kaj proponas elaĉeti la kulpojn per mono. Tiu transtomba aritmetiko lasas lin ĝui pli trankvile la profitojn de sia hipokriteco. Ĉe la virtuloj, la religio kaj la moralo povas laŭiri paralele; ĉe la hipokrituloj, la konduto dancas laŭ malsama takto ol tiu, kiun diktas la Ordonoj.

Ju pli putriĝas la praktika moralo, des pli granda estas la fortostreĉo por refreŝigi ĝin per ĉifonoj de dogmoj. Pro tio estas bombasta la retoriko de Tartufo, ĉeftipo de la ĝenro, kies kreado metas Moljeron inter la plej geniaj psikologoj el ĉiuj epokoj. Lia moralo estas tiu de la jezuita hipokriteco : "... la skandaliĝo de la mondo provokas la ofendon; kaj peki silente, tio ne estas peki..."

La moralo de la virta homo estas alia : ĝi kuŝas en la agoj, pli ol en la vortoj. Sokrato kaj Kristo

estis virtaj, kaj ambaŭ mortis ĉe la manoj de fanatikuloj jam senigitaj el ĉia moralo. En la krizaj horoj, la fido agonias en la fanatikismo kaj vivas en la idealoj, kiuj renaskiĝas fronte al ĝi, rulvolve, kvankam ofte antaŭdestinitaj fariĝi novaj fanatikismoj kaj kontraŭstari al estontaj idealoj.

La respekto al la formoj igas la hipokritulojn de ĉiu lando kaj epoko akiri apartan manieron, kiu malkaŝas la tartufismon de ĉiuj ĝiaj adeptoj, kiel la parenceco de la anoj de sama arta tendenco aŭ beletra skolo. Tiu stigmato komuna al ĉiuj hipokrituloj, kiu permesas rekoni ilin malgraŭ la individuaj nuancoj markitaj de la rango aŭ riĉo, estas ilia profunda abomeno al la vero.

La hipokriteco estas pli profunda, ol la mensogo. La hipokritulo transformas sian tutan vivon je mensogo metode organizita, kiu paralizas liajn lipojn, kiam alvenas la horo eldiri la veron. Neniam la Homaro aŭskultis vortojn pli noblajn, ol kelkajn de Tartufo; sed ankaŭ neniam iu homo agis pli malkonforme al ili. Kiu ajn estas lia socia rango, la hipokritulo ĉiam estas preta flati la potenculojn kaj trompi la modestulojn, mensogante al ambaŭ.

La mensogulo perfidas : liaj viktimoj aŭskultas al li supozante, ke li diras la veron. Li konspiras kontraŭ la trankvilo de la aliaj; li dissemas la malsekurecon kaj la malfidon. Li konjektas, ke la homo sincera estas forta kaj individuista, ĉar lia sinteno opozicia al la hipokriteco estas rezistado al la malbono sieĝanta lin ĉiuflanke.

Oni nur tion ŝajnigas, kion oni kredas ne havi : la masko servas al la malfortuloj. Ĝi taŭgas en la nuntempaj mezaĉokratioj malgraŭ tio, ke ĝiaj uzantoj ne havas moralan aŭtoritatecon ĉe la virtaj homoj. Ĉi-lastaj ne kredas al la hipokritulo, unuafoje malkovrita; ili neniam kredas al li, nek povas kredi al li, kiam ili suspektas, ke li mensogas.

La kutimo de la farsado disfaligas la hipokritajn karakterojn fulmrapide, kvazaŭ ĉiu nova mensogo puŝus ilin lavange al la abismo. La hipokritulo ne aspiras esti virta, sed aspekti tia. Li ne admiras intime la virton, sed volas esti kalkulata inter la

virtuloj pro la honoroj kaj premioj, kiujn tia kondiĉo povas alporti al li. La virto kaj la merito ne estas kongruaj kun la tartufismo; la observkapablo inklinigas malkonfidi je la misteraj virtoj.

Sen kuraĝo pri la vero, neeblas kuraĝi pri la justeco. La singarda malkuraĝo de la hipokritulo malhelpas lin esti juĝisto ĉiam, kiam li povas kompromitiĝi per verdikto. Li arde malamas la justajn homojn; senkreditigas ilin kaŝe, perfidas ilin ĉiam. Ni tremu kiam li ridetas : li palpas la tenilon de iu stileto kaŝita sub la mantelo.

La hipokritulo pensas nur pri si mem, ne sin donante, sen eluziĝi, kuntiriĝante, atrofiiĝante. Li ne sentas la rason, la patrion, la klason, la familion, nek la amikecon, kvankam li mensogas pri ili por ekspluati ilin pli bone. Li perdas la sencon pri la socia solidareco; li opinias la bonfaradon industrio profitiga por sia reputacio. Lia nomo aperas ĉe la unua vico en ĉiuj publikaj monkolektoj, sed kaŝe li ne etendus sian manon. Private li praktikas la uzuron kaj tiras profiton el alies malsato.

La armiloj de la hipokritulo estas potencaj, ĉar videblaj : per falsa suspekto li povas veneni feliĉon, rompi interkonsenton.

Li senĉese malkonfidas je ĉiuj; lia malkonfido estas karikaturo de la delikateco de la fiera homo, kun kiu ne kongruas la kutimo ŝajnigi. La konduto de la tartufoj ne povas resti diamanta. Ĉar ili prunteprenas la antaŭjuĝojn de la aliaj, kaj morale ŝuldiĝas kontraŭ la socio, ili perdas la timon peti aliajn favorojn, forgesante ke la ŝuldoj nesingarde amasigitaj sklavigas la homon. Ekzistas aliaj konsekvencoj de la tartufismo : la hipokriteco ne ligas pro la koro, sed pro la intereso. La hipokrituloj, devige inklinaj al utilismo kaj oportunecoj, estas ĉiam decidaj perfidi siajn principojn omaĝe al iu tuja bono; tio baras al ili la amikecon kun superaj spiritoj.

Inter eminentaj homoj la amikeco kreskas malrapide kaj prosperas pli bone, kiam ĝi radikas je la rekono al reciprokaj meritoj; inter vulgaraj homoj ĝi kreskas senmotive, sed restas ŝrumpinta, kaj ofte baziĝas sur la kompliceco en malvirto aŭ intrigoj.

Ĉar mallojala, la hipokritulo estas ankaŭ sendanka. Li inversigas la formulojn de la danko : li aspiras la diskonon de la favoroj, kiujn li faras, kaj pro tio ne estas sentema je tiuj, kiujn li ricevas. Kion li donas, tion li milobligas; kion li akceptas, tion li miliononigas.

La psikologio de Tartufo estus nekompleta, se ni forgesus, ke kontraŭ la instinkta pudoro - laŭdifine ĉasta - la hipokrituloj organizis konvencian pudoron, malĉastan kaj korodan. La amkapablo, kies flagroj sanktigas la vivon mem eternigante ĝin, ŝajnas al ili nekonfesebla, kvazaŭ la kontakto de du amantaj buŝoj estus malpli natura ol la kiso de la suno varmiganta la florkolorojn. Ili opinias, ke la malbono ne kuŝas en la aferoj mem, sed en la ŝajnoj, kaj formas unu moralon por si kaj alian por la ceteraj.

Senmezura estas tiu aŭdaca ekstremo de la hipokriteco. Persekutantoj de la plej puraj montroj de la arto, ili metus vitfolion en la manon de Venuso, konfuzante la ĉastegan harmonion de la klasika beleco, kun sia malpura intenco ekrigardante ĝin. Ili ne rimarkas, ke la perverseco estas ĉiam en ili, ne en la artverko.

La pudoro de la hipokrituloj estas la peruko de ilia morala kalveco.

## II. La honesta homo.

Li povas timi la krimon kaj admiri sanktecon : li malhavas iniciatemon por ambaŭ. Oni povas esti honesta, ne sentante deziregon pri perfektiĝo; por tio troas la nemontrado de malbono, sed tio ne sufiĉas por esti virta. Inter la malvirto, kiu estas ulcero, kaj la virto, kiu estas kulmino, fluktuas la honesteco.

La virtulo antaŭiras iun formon de estonta perfektiĝo kaj oferas al ĝi la aŭtomatecojn solidigitajn de la kutimo. La honestulo, kontraŭe, estas pasiva; kaj tiu cirkonstanco atribuas al li moralan nivelon superan al tiu de la malvirtulo, kvankam li restas sub tiu de la homo, kiu aktive praktikas iun virton kaj orientas sian vivon en direkto al iu idealo.

La supera homo praktikas la virton tiel, kiel li opinias ĝin, evitante la antaŭjuĝojn, kiuj jugas la honestan amason; la triviala homo daŭrigas nomi bono tion,

kio jam ĉesis esti tia, pro sia nekapablo antaŭvidi la estontan bonon.

La virto kutime estas aŭdaca ago. La trivialulo timas la publikan opinion; neniam li aŭdacas kontraŭstari ĝin. Li rezignas ĉian virton pro la oferoj, kiujn ĝi implicas.

La honestulo, fatrasa homo farita kvazaŭ per pecetoj de kateĥismo kaj restaĵoj de honto, malamiko de la sanktulo, samkiel la rutinema homo estas tia rilate la genion, li ofte tenas sin honesta pro konveno, foje pro stulteco, se la tento ne malkvietigas lian malsaĝon.

La honesteco estas atingebla de ĉiuj; la virto apartenas al la elitoj. La unua estas industrio; la lasta forigas la kalkulemon. Estus bonege prediki la honestecon, se tio ne signifus rezigni la virton, kiu celas la senĉesan perfektiĝon. Admiri la honestan homon estas senvaloriĝi; adori lin estas malnobliĝi.

Talran' (Talleyrand) demandis : "...Kio fariĝus tiaj uloj, se intereso aŭ pasio ekludus...?" Ilia timo je la malvirto kaj ilia nekapablo je la virto egalas. Ili ne estas murdistoj, sed ankaŭ ne herooj; ankaŭ ne ŝtelistoj, sed ili ne helpas al la ĉifonuloj; ili ne estas perfiduloj, sed ankaŭ ne lojalaj; ili ne rabas, sed ne defendas la prirabiton; ili ne perfortas virgulinojn, sed ne elaĉetas pekulinojn; ili ne konspiras kontraŭ la socio, sed ne kooperas por la komuna pligrandiĝo. Kontraŭ la hipokrita honesteco, ekzistas morala heraldiko, kies blazono estas la virto, kiu postulas fidon, entuziasmon, pasion, kuraĝon por vivi. Ilin ĝi postulas en la intenco kaj en la agoj. Ne estas virto, kiam la agoj dementas la parolojn, nek nobleco tie, kie la intenco rampas. Al tiu, kiu ĝuas ilin, la privilegioj de naskiĝo kaj kulturo trudas lojalecon ekzemplan al si mem. Kiu montras en siaj agoj respekton al sia rango, tiu estas nobla kaj ne tiu, kiu pretekstas pradevenon por pravigi malnoblajn agojn. Laŭ la virto, neniam laŭ la honesteco, oni mezuras valorojn de la morala aristokrateco.

o o
o

## III. La transfuĝintoj de la honesteco.

En la krepusko prosperas la malvirto, kiun la trivialeco protektas; dum la nokto floras la delikto, kiun subpremas la leĝoj forĝitaj de la socio. Ekde la hipokriteco tolerata ĝis la krimo punata, la transiro estas nesentebla. De la konvencia honesteco oni transiras laŭgrade al la fiago, per mildaj nuancoj kaj subtilaj koncedoj. La transfuĝintoj de la moralo atakas la principojn konfirmitajn; kaj, ĉar la socio ne povas toleri ilin ne endanĝerigante sian ekziston, ili disvolvas sian militon kontraŭ tiu aferordo, kies prigardo obsedas la trivialulojn. Se oni komparas lin kun la morala kriplulo, la honesta homo aspektas kiel juvelo. Se li ne scipovas flegi idealon, ankaŭ li ne kapablas krimi malkaŝe; li ŝirmas la malvirton, evitas la delikton punatan de la leĝoj. Li klopodas meriti la purgatorion; kontraŭe, la krimuloj elektis la inferon, atakante sen skrupuloj nek rimorsoj la muntaĵon de antaŭjuĝoj kaj leĝoj, kiun la socio kontraŭmetas al ili.

Ĉiu homo kredas, ke la vera moralo estas "lia moralo", forgesante, ke ekzistas tiom da ili, kiom da homoj.

Ĉiaj reguloj estas relativaj, kaj transformiĝas impulsataj de la implikita determinismo de la socia evoluo. En ĉiu medio kaj en ĉiu epoko, meza kriterio sankcias kiel bonajn aŭ malbonajn, honestajn aŭ krimajn, permesatajn aŭ neakcepteblajn, la agojn individuajn utilajn aŭ nocajn al la kolektiva vivo.

La krimuloj ne kapablas adapti sian konduton al la meza moralo de la socio, kie ili vivas. Ili havas la animon de la speco, sed ili ne akiras la "socian animon".

Sennombre paradas en la kalejdoskopo la plej fiaj cikloj de danteska infero : parazitoj de la socia rubo, friponoj, gastoj ĉe la tablo de la malvirto kaj la malhonoro, malnormaluloj, morbaj spiritoj korodataj de la ĉirkaŭa mizero.

Nevenkeblaj kaj nesubmeteblaj, ili akceptas la vivon socian kiel senĉesan spiton. Ili preteriras nin sentreme, mallume, viktimoj de kompleksa determinismo

supera al ĉiu etika bremso : en ili kolektiĝas la malekvilibroj transdonitaj de malsaneca heredo, la senformaj moralaj konturoj skizitaj en la socia medio, kaj la mil neeviteblaj cirkonstancoj, kiuj hazarde kunpuŝiĝas en ilia ekzisto. Ili vivas adaptitaj al aparta moralo, en la tumulta svarmo de la modernaj grandurboj.

Ili obtuze konspiras kontraŭ la stabileco de la socia konstruo, fremdaj al la kondutnormoj karakterizaj al la triviala homo, kiu estas rimarkinde konservativa kaj disciplinita. En tiu malnormala grupo elstaras la limlandanoj de la delikto, kretenoj de la honesteco. Ili ne estas krimuloj, sed ne kapablas teni sin honestaj : bari sekure la okazajn faktorojn, la sugestojn de la medio, la tentojn pri facila gajno. Jen ili duonkrimas pro nekapablo efektivigi kompletan planon de kontraŭsocia konduto, jen ili havas sufiĉan ruzon kaj antaŭvidon por atingi ĝuste la randon de la frenezulejo kaj la karcero, kaj ne fali. Tiuj uloj kun nekompleta moralo alterna, reprezentas la stadiojn de la transiro inter la honesteco kaj la krimo. Ili malhavas la oportunisman ekvilibron, kiu savas aliajn trivialulojn el la pereo.

Neforigebla stigmato malhelpas al ili konformigi siajn sentojn al la moralaj kriterioj de sia socio. Jen ĝi estas produkto de la denaska temperamento; jen morala degenero, frukto de la edukado; jen lukto pro la vivo en socia medio malfavora al ilia penado; jen inversigo de etikaj valoroj.

Ekzistas malkonstantuloj, kies karaktero montras foreston de fundamentoj solidaj sekurigantaj ilin kontraŭ la fluktua ir-reiro de la materialaj urĝoj kaj la malkvietaj okazoj de la malhonestaj tentoj. Tiuj homoj neadaptiĝemaj agas en la socio kiel la malutilaj insektoj en la naturo. La homoj singardaj ne pardonis al ili tiun fiagon kaj organizis kontraŭ ili kompleksan muntaĵon defendan de kodoj, juĝistoj kaj prestiĝoj tra sinsekvaj jarcentoj, sed malefika estis ilia klopodo. Ili konsistigas hordon aŭdacan en la embusko kaj la perfida realigo de siaj tragikaj projektoj.

Iuj konfidas sian vanton al la akra tranĉilo, aliaj

ŝovas siajn facilajn ungegojn al la oro aŭ la gemoj, kiu vigligas ilian avidon nerezisteblan; kelkaj perfortas virgulinojn por liveri iliajn ĉarmojn al la nesatigebla volupto de la diboĉuloj; multaj elsuĉas la internaĵon de la mizero, en neverŝajnaj aritmetikoj de uzuro; aliaj varbas senspertulojn por ekspluati la riĉajn trezorojn de nesciado kaj fanatikismo. Egalaj estas ĉiuj en la ludado de sia parazita rolo kontraŭsocia.

Kia ajn estas tamen ilia malsupereco biologia aŭ socia, ni trovas trajton komunan en ĉiuj homoj, kiuj staras sub la nivelo de la trivialeco : ilian konstantan malkapablon por adaptiĝi al la kondiĉoj, kiuj en ĉiu homa socio limigas la lukton pro la vivo. Ili malhavas la econ, kiu permesas al la triviala homo imiti la antaŭjuĝojn kaj hipokritecojn de la socio, kie li vegetas.

IV. <u>Socia funkcio de la virto</u>.

Ni distingis la krimulon disde la honestulo. Ni insistu, ke lia honesteco ne estas virto. Esti honesta implicas submetiĝi al la kutimaj konvencioj : esti virta ofte signifas kontraŭstari ilin.

Se ekzistus eterna moralo, oni povus preni serioze la biblian legendon de la arbo ŝarĝita de fruktoj de bono kaj malbono. Ne la honestulo - homo morale triviala - determinas la transformiĝojn de la moralo, sed la virtuloj kaj sanktuloj.

Pioniroj, apostoloj, martiroj, elpensas superajn formojn de la bono, instruas ilin, predikas ilin, trudas ilin. Sen tiuj originalaj homoj, estus nepensebla la transformiĝo de la moroj : ni konservus la sentojn kaj pasiojn de la primitivuloj.

La evoluo de la virtoj dependas de ĉiuj faktoroj moralaj kaj intelektaj. La cerbo kutime antaŭiras la koron; sed niaj sentoj influas pli intense, ol niaj ideoj en la formiĝado de la moralaj kriterioj. Dum jarcento ŝanĝiĝas la fundamentaj ideoj de la filozofio kaj la scienco; la kernaj sentoj de la kolektiva moralo ricevas nur malgrandajn fluktuojn, ĉar la biologiaj kvalitoj de la homa speco varias malrapide. Kio senĉese varias, tio estas la formo, la valorpri-

juĝo, kiu liveras al ĝi etikan valoron.

Tamen estas kolektiva progreso morala. Multaj dogmoj, kiuj antaŭe estis virtoj, pli malfrue estas opiniataj kiel antaŭjuĝoj.

La virtuloj ne egalas la sanktulojn; la socio metas tro da baroj al iliaj streboj. La virto estas reala tendenco al tio, kion ni konceptas ideala perfektiĝo.

La etika progreso estas malrapida, sed certa. Dum la idealo absoluta restas nedifinita kaj prezentas malmultajn variojn en la daŭro de tutaj jarcentoj, la konkreta koncepto de la virtoj cementiĝas en la realaj varioj de la socia vivo.

Ĉiu sento utila por la homa vivo naskas virton, normon de morala talento. La triviala homo ne konas tiujn virtojn; li limiĝas observi la leĝojn, timante la punojn destinitajn al ties malobservantoj.

## V. La eta virto kaj la morala talento.

La temperamentoj virtokapablaj malsamas laŭ la intenseco. La boneco estas la unua strebado al la virto. Kelkaj troigoj de boneco ne povus distingiĝi disde la malnobliĝo : estas manko de justeco en la moralo de la sistema pardono. Kiu pardonas dufoje, tiu fariĝas komplico de la fiuloj. Ni ne scias, kion estus farinta Kristo, se oni estus frapinta la duan vangon, kiun li oferis, kiam oni frapis al li la unuan.

Ni instruu pardoni, sed ni instruu ankaŭ ne ofendi : tio estus pli efika. Sed ni instruu tion laŭ nia ekzemplo.

Dum la hipokrituloj preskribas la moderon kaj rezervas la indulgemon al si mem, la etaj virtuloj preferas la praktikadon de la bono, ol ties predikadon, kaj ekzaltas sian propran konduton. Ili neniam forgesas siajn proprajn kulpojn kaj erarojn, kaj ne pravigas alies mankojn, ĉar ili scias, ke la tempo fatale punas ilin. Ilia koro estas tuŝebla de la vibroj de la aliaj; ili faras ĉiam tiom da bono, kiom ili povas; ili akceptas kaj kuraĝigas kiun ajn ĝermon de kulturo; ili estas sincere afablaj al la humilaj animoj. Tiuj etaj virtoj estas kutimaj, oftaj, ĉiutagaj;

ili taŭgas por distingi la bonulon disde la trivialulo. Ni tamen ne forgesu, ke estas grava eraro kompari ilin al la grandaj. Ili estas laŭdindaj, sed diferencas de la diligenta strebado al la perfektiĝo, kiu transformas bonecon en virton : la nekapablo pri malbono ne estas boneco. Stulteco ne supozigas virton, nek inteligenteco signifas perversecon. Multaj malspertuloj protestas kontraŭ la genieco kaj klereco, glosante la paradokson de Ruso', eĉ deduktante el ĝi, ke la lernejo popolas la karcerojn kaj ke la plej bonaj homoj estas la malspritaj kaj nesciaj.

Nu, mensogo, trompo kruda, kiun oni uzas kontraŭ la homa dignigo pere de la publika instruado, baza postulo de la morala nobligo. Scienco kaj Virto fariĝas ununura rezulto : Saĝeco. La plej klera homo povas esti la plej bona, kvankam ne ĉiam li estas tia. Tamen, la homo mallerta kaj nescia neniam povas esti tia, nepre.

La moralo estas tiel grava, kiel la inteligenteco en la totala konsisto de la karaktero. Izolaj ili havas malpli da valoro; ofte ili ĝermas samtempe en eksterordinaraj homoj. La subordigo de la moralo al la inteligenteco estas rezigno je ĉia digno; la homo plej sprita estus abomeninda, se li metus sian spriton je la servo de la rutino, la antaŭjuĝo aŭ la servuto; liaj venkoj estus lia honto, ne lia gloro.

Inter la talentoj intelektaj kaj la moralaj, ĉilastaj kutime estas prave preferataj, ĉar oni opinias ilin pli necesaj. Laŭ Smiles : "La supera talento, jen tiu estas la talento morala". Estas trompe kontraŭmeti inteligentecon kaj moralon kiel terminojn neakordigeblajn. Tion sufloras katekizistoj, kiuj flatas la stultulojn post la sukceso, kaŭze de ilia senfina nombro. La sofismo estas simpla. Pri multaj grandaj homoj oni rakontas moralajn anomaliojn, kiujn oni ne rakontas pri la trivialulo; do, ĉi-lasta estas virta, kaj la unuaj, malmoralaj.

La premiso estas falsa. Se oni rakontas malnormalaĵojn pri la genioj kaj ne pri la gapuloj, tio ne estas ĉar ĉi-lastaj estas lumturoj de virto, sed pro simpla kialo : la historio nur mencias la geniojn kaj tute ignoras la gapulojn. Jes, estis drinkema poeto,

filozofo edzinmurdista kaj sciencisto kruela; la milionoj da anonimaj uloj ne havas biografion. Ni vizitis cent karcerojn kaj ni certigas, ke estis kvindek mil homoj mense malsuperaj apud dek aŭ dudek talentaj homoj; sed ni vidis neniun genion.

Alta inteligenteco favoras la moralan talenton, kiu estas la nepra kondiĉo de la virto. Nur estas io pli vasta, ekzempla, majesta, kiu levas al la nekonateco, al la plej altaj pintoj de tiu morala aristokrateco; tio estas la genioj, kiuj instruas virtojn ne praktikitajn, aŭ praktikatajn kun eksterordinara intenseco. Se iu homo enreligas absolute sian vivon en direkto al iu idealo, li leviĝas super la nivelon mem de la plej altaj virtoj : li eniras la sanktecon.

VI. La morala genio : la sankteco.

La moralaj genioj estas la sanktuloj de la homaro. La evoluo de la kolektivaj sentoj efektiviĝas pere de eksterordinaraj homoj. Kelkaj leĝodonas kaj fondas religiojn : Konfucio, Moseo, Buddho; aliaj predikas kaj travivas sian moralon : Sokrato, Zenono, Kristo; aŭ transformas racie la doktrinojn : Epikuro, Spinoza. Ili ĉiuj estas originalaj fortoj en la evoluado de la virtoj.

Ĉia sankteco estas troa, obseda, submetiva, superabunda : ĝi estas genieco. Oni estas sankta laŭ temperamento, ne laŭ raciaj doktrinoj. La praktikaj faktoroj de la socia vivo ne estas la sanktuloj sed la amasoj, kiuj imitas malforte ilian formulon. Francisko Asiza ne estis efika instrumento de la bonfarado, virto kristana, kiun la tempodaŭro anstataŭigos per la socia solidareco. Ĝiaj utilaj efikoj estas kaŭzataj de sennombraj individuoj, kiuj estus nekapablaj praktiki ĝin laŭ propra iniciatemo, sed ricevas de la fervora ĉeftipo sugestojn, tendencojn kaj ekzemplojn, kaj disvastigas ilin.

La sankteco kreas. Se ni akceptas, ke la moralo formiĝadas, necesas, ke ĝi estu la eltrovo de individuo aŭ de grupo. Ĉiuj akceptas la eltrovintojn en geometrio, en muziko, en belarto aŭ meĥaniko; sed ankaŭ ekzistis homoj tre superaj al siaj samtempuloj, kiuj estis pio-

niroj, iniciatintoj. La antaŭeniro estas proporcia al la sento kaj ne al la penso. Tial la morala genio estas nekompleta, dum li ne agas; la sankteco kuŝas en la ekzemplo, antaŭ ol en la doktrino. La tieltitolitaj sanktuloj de iuj religioj malofte estas kreivaj : ili estas nuraj virtuloj aŭ halucinuloj, al kiuj la interesoj de la eklezia politiko atribuis nominalan sanktecon. Nur tiuj estas genioj, kiuj fondas aŭ transformas, sed neniel tiuj, kiuj organizas ordenojn, establas regulojn, praktikas normojn aŭ disvastigas kateĥismon.

Ni metu pli alten la sanktecon, nome tien, kie ĝi montras orienton nekonfuzeblan en la historio de la moralo. Ĉiu horo de la homaro havas etoson favoran al la florado de kelkaj virtoj. Evoluanta homaro ne povas havi fiksajn idealojn, sed senĉese perfektiĝantajn, kies transforma potenco estu senfina kiel la vivo. Ĉiu historia tempo postulas ian formon de sankteco, kiu estus senfrukta - se maloportuna - ĉar la virtoj modliĝas laŭ la varioj de la socia vivo.

En la aŭroro de l'popoloj nepre necesas esti forta por sekurigi la liberecon de la grupo : la plej altaj kvalitoj estas la fizika supereco kaj la kuraĝo. Sankteco kuŝas en heroeco.

Dum la grandaj krizoj de morala renoviĝo, la plej alta virto estas la firmeco de la karaktero. Sankteco estas apostoleco.

Dum la florado de la civilizacio, servas al la homaro la eltrovinto de nova natura leĝo aŭ de instrumento, kiu mastras ĝiajn fortojn. La prestiĝo kronas la intelektajn virtojn. Sankteco kuŝas en saĝeco.

Ĉiu epoko havas siajn idealojn kaj siajn sanktulojn: heroojn, apostolojn, saĝulojn.

La nacioj atingintaj certan kulturnivelon sanktigas en siaj grandaj pensuloj la heroldojn de sia spirita grandeco. La sankteco varias laŭ la idealo. En la modernaj socioj la "sanktulo" estas profeto pri faktoj, kiujn la posteularo konfirmas, aplikas aŭ efektivigas. Estas sankteco servi idealon en la batalkampoj aŭ defiante hipokritecon, sed ankaŭ estas sanktuloj la poeto, la saĝulo aŭ la filozofo eterne vivantaj en la "Dia Ko-

medio" aŭ "La deveno de la specioj".

La homaro senripoze supreniras al foraj pintoj. Gvidataj de eta grupo de antaŭvidemaj lumoj, la generacioj supreniras ekde la Rutino al Veroj ĉiam malpli kaj malpli malĝustaj kaj ekde la Antaŭjuĝo al Virtoj ĉiam malpli kaj malpli malperfektaj.

Ĉapitro 4 :

# La trivialaj karakteroj

## I. Homoj kaj ombroj.

La trivialaj karakteroj transiras la mondon priatentante sian ombron, kaj ignorante sian personecon, sen la plezuro ekkrii : "mi estas", antaŭ la aliaj. Ili forviŝiĝas, kaj farbiĝas per alies koloroj, apogante ĉiujn doktrinojn kaj antaŭjuĝojn solidigitajn tra la jarcentoj. Ili prosperas laŭirante la vojon de la pli malgrandaj rezistoj, naĝante laŭ ĉiaj fluoj. Ili kreskas, ĉar ili scias adaptiĝi al la socia hipokriteco, kiel la lumbrikoj al la terinterno. Ili ne havas lumon, aŭdacon, fajron, emocion. Ĉe ili ĉio estas pruntita.

En la fajnaj karakteroj, ĉio estas brilo kaj firmeco. Ili kreas sian vivon kaj servas Idealon, persistante en sia vojo, sentante sin mastroj de siaj agoj, hardiĝante per grandaj klopodoj; certaj pri siaj kredoj, lojalaj al siaj ŝatoj, fidelaj al sia parolo. Ili posedas firman moralan vojon, kiu estas ilia skeleto aŭ armaĵo. Rolantoj en la socia dramo, kun neelĉerpebla energio, ili estas nekonfuzeblaj. Ili posedas la kapablon rezisti al la rutino, kaj ili povas liberiĝi el ĝia alniveliga tiraneco. Ili estas troigaj; ili centobligas la kvalitojn, kiujn la aliaj nur ĝerme posedas. Sen ili senmoviĝus la homa progreso; nur pri ili kutimas okupiĝi la Historio, prezentante ilin kiel Ĉeftipojn de la Homaro.

La homo, kiu pensas laŭ sia propra kapo kaj la ombro, kiu spegulas alies pensojn, ŝajnas aparteni al malsamaj mondoj : Homoj kaj Ombroj, ili diferencas

kiel la kristalo kaj la argilo. La kristalo havas formon antaŭdifinitan; ĝi neniam prenos alian, nekonfuzeble. Sammaniere la supera homo estas ĉiam unueca, aparte de lą aliaj, kvazaŭ la kristalo, kiu faras novajn tavoliĝojn, kreante formojn el sia propra geometria sistemo. La argilo ne havas propran formon kaj prenas tiun, kiun trudas al ĝi la eksteraj cirkonstancoj. Ĝi konservas la spurojn de ĉiuj fingroj; ĝi estos kuba, sfera aŭ piramida, laŭ tio, kiel oni modlas ĝin.

La trivialaj karakteroj ne scipovas servi al fido aŭ pasio. La kredoj subtenas la karakteron, kiu esprimas sin per aktivecoj, kiuj konsistigas la konduton. La ombroj ne kredas.

La forto de la kredoj konsistas en tio, ke oni ne povas esti pure racia; oni pensas per la koro kaj la kapo. Oni kredas tion, kion oni asertas aŭ neas. La malo de la jesigo ne estas la neado sed la dubo. Por aserti aŭ nei, necesas kredi.

Esti <u>iu</u> estas kredi intense; pensi estas kredi; ami estas kredi; malami estas kredi; vivi estas kredi.

Sen unueco iu karaktero estas nekonceptebla. Kiam ĝi mankas, la homo estas senforma aŭ malstabila. Tiu unueco devas esti efektiva dum la tempo; ĝi dependas grandparte de la kunordigado de la kredoj, kiuj estas fortoj dinamikaj kaj aktivaj, sintezantaj la personecon. Ili ebligas la homon agi rekte, laŭ vojo signita. Ili sentiĝas liberaj, kiam ili korektas siajn erarojn, kaj eĉ pli liberaj, kiam ili regas siajn pasiojn. Ili scias poluri la laboron de siaj edukistoj, kaj ili neniam kredas sian propran kulturon finita.

La Homoj havas kredojn profundajn, radikiĝintajn. Ili povas evolui laŭ la evoluo de la kredoj, kaj povas ŝanĝi ilin, dum ili daŭrigas lernante. La Ombroj aranĝas la proprajn kredojn al siaj avidoj kaj pretendas kaŝi la maldignon per la nomo : evoluo.

Laŭ la biblia sentenco : "Per viaj agoj vi estos juĝataj". Estas multaj, kiuj ŝajnas homoj kaj valoras nur laŭ la pozicioj atingitaj en la mezaĉokratiaj gregoj ! Esplorante de proksime iliajn verkojn, oni konstatas, ke ili estas malpli ol nenio, negativaj valoroj, nu ! <u>OMBROJ</u> !

II. La submetiĝo de la trivialuloj.

Dum la homoj rezistas al la tentoj, la ombroj glitas malsupren laŭ la deklivo. Ili ŝajnas solidaj kaj moliĝas; raspaj kaj glatiĝas; malmildaj kaj mildiĝas; varmaj kaj malvarmiĝas; brilaj kaj mallumiĝas; ardaj kaj malvigliĝas; virecaj kaj femaliĝas; orgojlaj kaj humiliĝas. Ili modlas sian koron laŭ la antaŭjuĝoj kaj sian inteligentecon laŭ la rutinoj : la submetiĝo faciligas al ili la lukton por la vivo.

Gil-Blas (rolulo de franca verkisto Alain Lesage) simbolas la praktikan homon, kiu tiras profiton el ĉia friponeco. Li estis rabisto, klaĉisto, ŝtelisto, uzuristo, murdisto, trompisto; kaj ĵurrompinto, hipokritulo, nedankemulo, perfidulo, politikisto. En sia speco li estas perfekta. Lia sekreto estas simpla : li estas hejma besto : servutulo ĝismorta.

Ni devus tute kopii la elokventan "Prelego pri la Memvola Servuto" de La-Boesi', en kiu miloj da paĝoj kritikas la submetiĝon al la sociaj dogmoj, al la parvenuaj hierarkioj, al la volo de la potenculoj, al ĉio, kio sekvigas nepre la servutecon.

La fajnaj karakteroj estas nesubmeteblaj : ili celas al sia Idealo. La ombroj, kontraŭe, degeneras; ili ne havas unuecan konduton, kiu ebligas antaŭvidi la geston en ĉiuj okazoj.

Ni insistu, ke la karaktero estas sintezo. Ĝi montras la tutan personecon, kaj ne estas izola elemento. Ĉiu homa idealo implicas asociiĝon sisteman de la moralo kaj la volo, direktante al la celo la plej fervorajn deziregojn pri perfektiĝo. Kiu posedas karakteron, tiu ne submetiĝas.

Kie servutuloj kaj sklavoj ekzistis, tie formiĝis rampaj karakteroj. La venkiton oni ne mortigis; oni laborigis lin por sia profito. La tempo kaj la praktiko adaptas onin al la servuta vivo, kreas risortojn ĉiam pli kaj pli solidajn, kiuj por ĉiam forviŝas ĉian individuan trajton. Kiu naskiĝas el servutuloj, tiu heredas servutajn morojn kaj ne akiras dignon. En ĉiuj blankrasaj nacioj, kie oni abolis la sklavecon, oni kutime rigardas per humiliga malŝato la mulatojn, posteulojn de la antikvaj sklavoj. La klaso kreas similajn malegalecojn, kiel la raso. La riĉiĝinta burĝo

meritas la malŝaton de la aristokrato pli ol la malamon de la proleto, kiu aspiras al la burĝeco; ne estas pli malbona ĉefo, ol la eks-helpanto, nek pli malbona mastro, ol la eks-lakeo.

Tiuj servaĉaj inklinoj, radikantaj ĉe la fundo mem de la etnika aŭ socia heredo, estas ŝatataj en la nuntempaj mezaĉokratioj, kiuj nivelas politike la servutulon kaj la dignulon. Antaŭ multaj jardekoj oni abolis leĝe la sklavecon aŭ la servutecon, sed ankoraŭ ekzistas la sklavo kaj la servutulo. Ili ne estas proprietaĵo de siaj mastroj, sed ili serĉas alies ŝirmon. Estas inklinoj, kiuj transvivas ĉiujn leĝojn egaligajn kaj amigas la jugon kaj la vipon. Ĉe kelkaj senkarakteraj uloj, la konduto ne povas sekvi konstantajn normojn. Ili posedas kelkajn validajn elementojn, disajn; la plej malforta skuo aperigas iliajn atavismojn de sovaĝulo kaj primitivulo. Pro tio ili estas kontraŭsociaj, nekapablaj leviĝi ĝis la modesta stato de gregaj bestoj.

Al aliaj malfeliĉuloj la socio avaras edukadon. En la grandurboj svarmas morale senŝirmaj infanoj, senhejmaj, seninstruaj, atakitaj de la mizero. Kun sia inteligenteco malakrigita kaj siaj plej bonaj emoj baritaj, se ili trapasas la infanaĝon ne falinte en la marĉon, ili poste stumblas kun novaj malhelpoj.

La laboro estus la plej bona lernejo de la karaktero, sed la socio instruas malami ĝin, kiel fian malnobliĝon, efektivigitan pro malsato aŭ avareco; la homo forfuĝas ĝin kiel punon. Tiel la socio kompletigas sian verkon : kiuj ne pereas pro la maltrafa edukado, tiuj ankriĝas ĉe la brutiga laboro.

Aliaj, kiaj Gil-Blas, ne havas kontrolon pri sia konduto kaj forgesas, ke la plej eta falo povas esti la komenca paŝo al kompleta degradiĝo. Malvarmeta etoso torporigas tiun, kiu cedas unuafoje al la tento de la maljusto; la konsekvencoj de la unua falo povas iri ĝis la senfino. La trivialuloj ne scias eviti ĝin; por la ombroj ne estas reboniĝo. Dum en la firmaj karakteroj ili forglitas ne lasante spuron, tiuj etaj mankoj en la molaj plugas sulkon, per kiu faciliĝas la vojo al la malnobliĝo, laŭ la deklivo, pligrandigante la bandon de lakeoj kaj parazitoj, kiuj ronĝas

la bazojn de la socio, kiu pretendis modli ĝin laŭ sia bildo.

Ĉiu funkciulo havas voreman gregon de submetitoj, obeemaj al liaj kapricoj. Ĉe la limoj de la oficiala influo, la rimedoj por la alkutimiĝo estas centoj, precipe en la landoj infektitaj de burokratismo. Homoj el malforta karaktero ne rezistas, cedas al tiu hipnotigo, kliniĝante al la manoj, kiuj hodiaŭ donas al ili la favoron, kaj morgaŭ gvidos la rimenojn. Servaĉuloj ekzistas en ĉiuj sociaj klasoj, kaj ilia prezo varias laŭ la rango.

La ombroj vivas dezirante kastri la firmajn karakterojn kaj senkapigi la flugilhavajn pensulojn, ne pardonante al ili la lukson esti virecaj aŭ havi cerbon. Kiam la nesciado ŝajnas koketeco, la meritoj iĝas danĝera kontrabando, kaj la digno fariĝas absurda kaj ridinda, tiam la submetiĝo de la trivialulo atingis la ekstremojn.

III. La vanteco.

Ekzistas unu moralo de la honoro kaj alia de ĝia karikaturo : esti aŭ ŝajni. La idealo pri perfektiĝo solidigas en la homoj la dignon. La kulto al la ombro vigligas la vantecon. Fratoj laŭ deveno, kiel Habelo kaj Kaino kaj pli malamikaj ol ili, nereamikiĝeblaj, ili estas diferencaj formoj de memamo. Unu floras el la fiero, la alia naskiĝas el la orgojlo : avido pri mastrado super la aliaj. La fiero estas nobla; la orgojlo estas senmezura vanteco, kiu klopodas larĝigi la ombron.

Obseditaj de la sukceso, multaj senkapabluloj vantiĝas pri iluziaj meritoj kaj eniras la vivon, konstruante al si scenejon, kun ĉiama prizorgo je la opinio de la aliaj rilate ilian ombron. Soifaj distingiĝi, okupi kaj kultivi la atenton de la aliaj, ili konsumas sian ekzistadon.

La ekzalto de la memamo utilas al la homo, kiu servas al Idealo. Tiu anticipiĝo de la gloro, superkreskigas la personecon de la superaj homoj : tio estas ilia natura kondiĉo. Ilia fiero neniam superas la vantecon de la stultuloj.

La vantulo trapasas sian vivon, komparante sin kun

la ĉirkaŭantoj, kaj enviante la bonon de la aliaj. La fiera homo ne komparas sin kun tiuj, kiujn li konsideras malsuperaj, kaj li metas sian rigardon tien supre, ĉe idealaj tipoj de perfektiĝo, kiuj fajrigas lian entuziasmon.

La babela lingvaĵo de la vulgaruloj implikis la signifon de la vorto, kaj finfine ni ne scias, ĉu ĝi difinas virton aŭ malvirton. Relative, se estas meritoj, la fiero estas rajto; se ne, temas pri vanteco.

IV. La digno.

Plej alta kredo de ĉia idealismo, la digno estas unika, netuŝebla, sintezo de ĉiuj virtoj, kiuj hardas la homon.

La diamantaj temperamentoj - firmeco kaj lumo - malproksimiĝas de ĉia kompliceco, liveras eĉ sian vivon mem antaŭ ol perfidi siajn idealojn.

La digno implicas moralan kuraĝon, sen kiu ne ekzistas honoro. La homoj timemaj estas senpovaj, samkiel la senpripensaj homoj. Ĉi-lastaj agas ne pripensinte; la unuaj pripensas, kiam konvenas agi. "La kuraĝo - sentencis Lamartin' - estas la unua elokventeco, tiu de la karaktero". La edifaj homoj konsideras sin superaj al tio, kion oni povas doni senmerite. Ili preferas vivi krucumite sur sia fiero, ol prosperi rampe. Ili restas solece, dum ili ne povas aliĝi al siaj similuloj.

Ili ne konas la malnoblaĵojn, kiuj dormas en la fundo de la servaĉaj karakteroj. Kiam la homamaso, kiu baras iliajn dezirojn, estas sensignifa, ili rifuĝas en si mem, kaj silentas. Kaj dum la etoso ŝanĝiĝas, ili atendas ankrite ĉe sia fiero, kvazaŭ ĝi estus la natura kaj plej sekura haveno por ilia digno.

Kun la obsedo dependi de neniu, ili scias, ke sen materiala sendependeco la honoro estas elmetita al mil makuloj. Potenca malamiko de la digno estas la mizero; ĝi bremsas la langon kaj paralizas la koron. Necesas eviti ĝiajn ungegojn por elekti al si la plej altan idealon, la plej agrablan laboron, la plej decan edzinon, la plej lojalajn amikojn, la plej plaĉajn celojn, la plej trankvilan hejmon. La malsatulo povas

esti ribelema, sed neniam libera homo. La feliĉo, kiun donas la mono, estas ne devi priatenti ĝin; pro tio ne estas libera la avarulo, nek feliĉa. Niaj posedaĵoj estas la bazo de nia sendependeco; tiuj, kiujn ni deziregas, estas kvazaŭ katenoj nititaj ĉe nia sklaveco. La nuraj posedaĵoj netuŝeblaj estas tiuj, kiujn ni amasigas en la cerbo kaj la koro; kiam ili mankas, neniu trezoro anstataŭas ilin.

La fieraj homoj kultas al sia digno. Nefleksseblaj, alteniĝemaj, ilia koro kun senduba fido, portas konvinkon, energion necedeman kaj sentiman. Venkantaj ĉiam sin mem, ili kompatas tiujn, kiuj en la vivbatalo disŝiras kaj disĵetas sian propran dignon.

La digno, strebado al aŭtonomeco, impulsas malpliigi la dependecon je la aliaj ĝis la nepra minimumo. "Akiri meritojn per aferoj, kiuj ne dependas de la aliaj, sed nur de ni mem..." sentencis La-Bruĵer'.

Tiu sentenco forigus la ruzaĵojn, la komplotojn, la friponaĵojn, la flatojn, la intrigojn. Kreskus la amo al la virto, la avido pri gloro, la kulto al idealoj pri senĉesa perfektiĝo. Tiu morala digniĝo de la homoj estigus en la historio la forpason de la ombroj.

## Ĉapitro 5 : la envio

### I. La pasio de la trivialuloj.

La envio estas la kateno, kiun trenas la fiaskintoj; la aloo, kiun gustumas la senpovuloj. Tiu pasio, la plej fia el la malnoblaj mankoj, kiuj malbeligas la vulgarajn karakterojn, estas la psikologia stigmato de humiliga malsupereco sentata, agnoskata. Por envii, necesas suferi pro la bonhavo de la aliaj.

La envio rongas la koron, kiel la rusto korodas la metalon. Jam la greklatina mitologio atribuis al ĝi superhoman devenon, naskiĝon el la noktaj ombroj. Oni difinis al ĝi vizaĝon de maljunulino terure malgrasa kaj sensanga, malamikecan rigardon, kavajn okulojn, nigre makulitajn dentojn, langon ŝmiritan per mortigaj venenoj; per unu mano ĝi prenas tri serpentojn kaj per la alia torĉon; en sia sino ĝi kovas monstran

reptilion, kiu forvoras ĝin senĉese kaj injektas al ĝi sian venenon; ĝi tremas, ne ridas, neniam mallevas la flamajn palpebrojn por ekdormi. La senindulga torturisto ĝi estas de si mem.

Tiu pasio favoras la hipokritecon. Plutarko ("Moralaj Verkoj") determinis diferencojn inter malamo kaj envio. Nur tion oni malamas, kion oni opinias malbona aŭ noca; kontraŭe ĉiuspeca prospero ekscitas la envion. Oni povas malami objektojn kaj bestojn; oni povas envii nur la homojn. La malamo insultanta estas timinda; la envio silenta kaj konspirema estas naŭza. Samkiel la oleo estingas la kalkon kaj vigligas la fajron, tiel la bono ricevita bremsas la malamon en la noblaj spiritoj kaj intensigas la envion en la fiaj. La enviulo estas sendanka, kiel la suno estas hela, tute nature. La malamo estas rekta; la envio, torda. La malamo bolas en la grandaj koroj juste kaj noble; la envio kuŝas en la etaj koroj. La senmeritaj homoj daŭrigas esti enviaj malgraŭ la sukcesoj atingitaj de ilia monduma ombro, kvazaŭ interna rimorso alkrius ilin, ke ili uzurpas tiujn. Konvenas subtiligi la problemon, distingante aliajn, kiuj similas al ĝi : konkurenco kaj ĵaluzo. Ekzemplo klarigos la demandon : ni envias la edzinon, kiun la najbaro havas kaj ni deziras, kiam ni sentas la neeblon batali pro ŝi. Ni ĵaluzas pri la virino, kiu apartenas al ni, kiam ni opinias malsekura nian posedon, kaj ni timas, ke alia povas partopreni ŝin aŭ forpreni ŝin de ni. Ni konkurencas pri ŝia amo en nobla rivaleco, kiam ni ekvidas la eblon atingi ĝin en egalaj kondiĉoj kun alia, kiu aspiras ĝin. La konkurenco ĉiam estas nobla; kelkfoje eĉ la malamo povas esti tia; nur la envio estas malkuraĝa.

La konkurenco implicas deziron de egaleco, eblon de niveliĝo, saluton al la fortuloj, kiuj marŝas al la gloro; nur la senpovulo venenas sian spiriton, barante la iradon de tiuj, kiujn li ne povas postsekvi.

## II. Psikologio de la enviuloj.

Ili prezentas senfinajn variojn, pro la kombiniĝo de la fundamenta stigmato kun aliaj. La enviulo pasiva estas solena, bombasta. Li neniam scipovas ridi per

inteligenta kaj sana rido. Lia rikano estas falsa, servaĉa. Serioza pro nekapablo, lin turmentas la rido de la kontentuloj.

La enviulo aktiva posedas sentiman elokventecon, kiu kaŝas per niagaroj da vortoj lian idean malplenon. Kiel la klasika rabeleza monstro, li ŝajnas posedi mil langojn, kiuj distilas sian vipuran insidon pere de avaraj laŭdoj; li havas mil krurojn kaj aperas ĉie; li semas la intrigon inter siaj propraj komplicoj kaj eĉ perfidas ilin. Kaj por esti kompleta, li estas malkuraĝa.

La destino kutimas grupigi la enviulojn laŭ heterogenaj klikoj aŭ rondoj kaj ligas ilin la mortero de la komuna sufero pro la feliĉo de la aliaj. Ili verŝas sian galon kontraŭ la enviitoj, kiel omaĝon al la supera talento, kiu humiligas ilin. La enviulo mortas ĉe la turmento envii tiun, kiu ignoras lin. Li malbenas la lumon ĉar li scias, ke en lia krepusko neniam ekbrilos glora tago. La kriterio por taksi la enviiton estas pure subjektiva : ĉiu homo opinias sin la mezuro de la aliaj, laŭ la prijuĝo, kiun li havas pri si mem. La riĉulo povas senti rivalecon aŭ ĵaluzon pri la riĉeco de la aliaj, sed li envias la talenton. La bela virino ĵaluzas alian belulinon, sed ŝi envias la riĉajn. Eblas sentiĝi supera en cent aferoj kaj malsupera en nur unu : jen la rompebla punkto, tra kiu la envio provos trapasi.

La envio estas neevitebla akcidento de ĉia sukceso, kvankam en kelkaj profesioj ĝi estas pli rimarkinda; la beletristoj ne postrestas, sed la aktoroj kaj publikulinoj estus ĉe la unua rango, se ne ekzistus la kuracistoj.

La motivo de la envio estas konfuzebla kun tiu de la admiro, kaj ambaŭ estas aspektoj de la sama fenomeno. Sed la admiro naskiĝas en la elstara homo kaj la envio en la subulo. La virina envio kutime estas fajna kaj perversa. La virino gratas per akra kaj brila ungo, mordas per orumitaj dentetoj, ĉifas per palaj kaj maldikaj fingroj. Se ŝi naskiĝis bela, ja sekura estas la kulto de la envio al ŝi. Vipuraj langoj bruligos al ŝi la incenson de la kritikoj; oblikvaj

rigardoj pafmortigos ŝian belecon depost la dorso.

La vulgara homo envias la riĉecon kaj la burokratajn poziciojn. Pro tio la skalo de la ŝtata buĝeto estas hierarkio de envioj perfekte gradigitaj laŭ la ciferoj de la sinekuro. Inter la viroj la talento estas la plej enviata trezoro. Sufiĉas, ke ĝi ebligas elstari en la sciencoj, la artoj aŭ la amo, por ke la trivialuloj ektremu pro envio.

La feliĉo de la fekundaj homoj martirigas la eŭnukojn, verŝante en ilian koron gutojn de galo, kiuj amarigas ilin por ĉiam. La paroloj kaj grimacoj de la enviulo dronas en la marĉo, kie li treniĝas, kiel siblоj de serpentoj salutantaj la flugon de la aglo, kiu serene ŝvebas alte, ne aŭdante ilin.

III. La ronĝantoj de la gloro.

La plej inteligentaj homoj scias, ke la naturdotoj ne transformiĝas en talenton aŭ genion sen klopodo, kiu mezuras ilian meriton, ke ĉiu paŝo al la gloro kostis laboron, strebadon, profundajn cerbumadojn, senfinajn provojn, persistan dediĉon. La enviulo, kiu ne scias tion, vidas la rezulton, kiun li ne atingas kaj ja la aliajn, ne konjektante, ke la vojo al la gloro estas prisemita de multaj dornoj.

La grandaj recenzistoj estas bonegaj aŭtoroj, kiuj riĉigas la verkojn, kiujn ili studas, kaj lasas postesignon de sia personeco en ĉio, kion ili tuŝas.

La aĉaj kritikistoj estas instinkte malamikoj de la verko. Ili deziras malgrandigi ĝin simple, ĉar ili ne verkis ĝin; nek ili scius verki ĝin kiam la kritikita verkisto dirus al ili : faru ĝin pli bone. En ĉio ili trovas motivon por malbeni kaj envii, malkaŝante sian internan angoron. Finfine, ili suferas, ĉar aliaj estas admirataj kaj ili ne.

La triviala kritikisto ne kapablas kunkudri tri ideojn ekster la fadeno, kiun la rutino trudas al li. Lia nesciado fiera igas lin konfuzi la marmoron kun la kalkoŝtono kaj la voĉon kun la falseto. Kaj li inkliniĝas supozi, ke ĉiu originala verkisto estas herezulo.

La originala verkisto scias, ke li turmentas la trivialulojn, spronante tiun pasion, kiu malsanigas ilin

pro la brilo de la aliaj. La malespero de la fiaskintoj estas la laŭro, kiu kronas bonege ilian luman laboron.

Ili fermentas en ĉiu speco de intelekta aktiveco. Ili vivas por makuli la originalan homon, kaj revas ekstermi lin. Ili komplotas impete kiel teroristoj, kaj svingas naŭzajn kalumniojn, kiuj ruĝigus elefanton.

Kiam lumo foras, ili ekaperas dekope, milope, kiel liliputanoj ĉirkaŭ giganto, el ĉiuj direktoj, por kanti ĥore sian kalumnion. Kaj ili ripetas, ke la genieco, la sankteco kaj la heroeco estas aberacioj, frenezo, epilepsio, degenero; ili neas la bonecon de la sprito, la virto kaj la digno. Ili metas tiujn valorojn sub sian propran duonombron; kaj ili ne avertas, ke tie ne atingas la trivialulo, kie la genio transpasas.

La rutinemaj spiritoj ĉiam konfuzos la eraron kaj la klarecon, humiligante ĉian idealon ĝis la malaltaj intencoj, kiuj pusas en iliaj cerboj.

Kiu ne admiras la plejbonon, tiu ne povas pliboniĝi. Kiu vidas la mankojn kaj ne la kvalitojn, la kulpojn kaj ne la meritojn, la malakordojn kaj ne la harmoniojn, tiu dronas en malalta nivelo, vegetante kun la iluzio esti iu kritikisto. Necesas kulturi la admiron samkiel sanktan fajron, evitante, ke la envio surkovru ĝin per sia fia patino.

La vera puno al tiuj parazitoj kuŝas en la muta rideto de la pensuloj. La silento de la aŭtoro mortigas ilin; lia indiferenteco sufokas ilin.

Kiu konscias pri sia merito, tiu elektas siajn rivalojn inter siaj egaluloj, siaj paruloj.

IV. <u>Drama sceno : ilia puno.</u>

Neniu malsanulo responsas pri sia malsano. La envio estas malsano, kaj nenio estas pli respektinda, ol la rajto plendi kiam oni suferas pro pletoro de vanteco.

La enviulo estas la nura viktimo de sia propra veneno; la envio forvoras lin kiel la kancero la internaĵon, sufokas lin kiel la hedero la kverkon.

Dante konsideris la enviulojn ne indaj pri la Infero. En sia saĝa disdono de sankcioj kaj punoj, li en-

fermis ilin en la purgatorio, kio konvenas al ilia trivialeco. Ili senkuraĝe sidas sur rondo el cindreca ŝtono apud murego blueca samkiel iliaj larmoplenaj vizaĝoj, kovritaj de turmentsakoj, prezentante scenon de vivanta tombejo. La suno rifuzas sian lumon al ili; iliaj okuloj estas kudritaj per dratoj, ĉar ili neniam povis vidi la bonon de la aliuloj. Por ili parolas nobelino Sapia, proskribita de siaj samcivitanoj; ŝia envio estis tioma, ke ŝi freneze ekĝojis, kiam ili estis venkitaj de la florencanoj. Kaj aliaj parolas per tragikaj voĉoj, dum malproksima tondrado memorigas pri la paroloj de Kaino post kiam li murdis sian fraton Habel. Ĉar la unua murdisto el la biblia legendo nepre devis esti enviulo.

<u>Ne esti enviata</u> estas senduba garantio pri trivialeco.

Ĉapitro 6 :

# la maljunaĝo alniveliga

I. <u>La grizharoj</u>.

La videblaj grizharoj rilatas al aliaj pli gravaj, kiujn ni ne vidas : la cerbo kaj la koro, la tuta spirito kaj la tuta amkapablo griziĝas samtempe kun la hararo.

Esti maljuna egalas esti triviala, kun maloftaj esceptoj. La plej granda malfeliĉo de supera homo estas transvivi sin mem, alniveliĝante kun la ceteraj.

La dekadenco de la maljuniĝanta homo estas reprezentata de sistema regreso de la intelektaj kapabloj. Komence, la maljunaĝo trivialigas ĉiun superan homon : pli malfrue, la kadukeco malsuperigas la jam trivialan maljunulon.

La homa personeco estas kontinua formiĝado, ne fiksa estaĵo. Ĝi organiziĝas kaj malorganiziĝas, evoluadas kaj malevoluadas, kreskas kaj malkreskas, intensiĝas kaj elĉerpiĝas. Ekzistas momento, kiam ĝi atingas sian maksimuman plenon; post tiu momento ĝi jam ne

kapablas pligrandiĝi, kaj baldaŭ estas videblaj la komencaj simptomoj de la falo, la flagroj de la interna flamo, kiu estingiĝas.

La rutino estas la mensa stigmato de la maljunulo; la ŝparemo lia socia stigmato. Kiam lia avido posedi superas lian viveblon, li jam estas morale kaduka. La avareco ekzaltas la sentojn egoistajn proprajn al la maljunaĝo. Malfekunda arbo ĝi estas: la homaro pereus, se ĝi devus nutriĝi el ĝiaj fruktoj.

La burĝa moralo de la ŝparemo, tiu pasio kolekti riĉaĵojn, kiujn oni ne ĝuas, kreskas laŭ la jaroj, inverse al la ceteraj. La avareco, malnobliga pasio, egalas la envion. Ĝi estas la morala pustulo de la maljuniĝintaj koroj.

## II. Stadioj de la dekadenco.

En la tavoloj primitivaj kaj fundamentaj de la karaktero kuŝas la inklinoj herede ricevitaj de la praulo j : "la menso de la speco".

En la mezaj tavoloj troviĝas la sugestoj edukaj de la socio : "la socia menso".

En la superaj tavoloj floras la varioj kaj perfektiĝoj ĵusaj de ĉiu, la personaj trajtoj, la nekolektiva posedo : "la individua menso".

Primitiva, meza aŭ supera, ĉiu plenaĝa homo trairas stabilan etapon, en kiu li perfektigas siajn akiritajn kapablojn, sed li ne akiras novajn. Poste la inteligenteco eniras sian krepuskon. La funkcioj de la organismo, kiel ankaŭ tiuj de la menso, ekdekadencas kiam la ĉeloj de niaj nervaj centroj komencas ŝimi.

Estas evidente, ke la homo ne konas sian propran krepuskon. Neniu maljunulo konsentas opinii sian inteligentecon malkreskinta.

La aĝo de la ekkadukiĝo diferencas de homo al homo; la organismaj sistemoj en kiuj komenciĝas la malevoluo estas malsamaj en ĉiu.

La sendube maljuneco estas tiu, kiu metas pli da sulkoj sur la spiriton ol sur la frunton. La juneco povas transvivi grizharojn : tio estas eco de vivo intensa, esprimplena kaj optimista.

La maljuneco komenciĝas per la transformado de ĉiu individuo en trivialan homon. La cerboĉeloj daŭrigas ŝimi, la aktiveco de la neŭronaj asocioj malgraviĝas ĉiam pli kaj pli kaj la detrua verko de la kadukeco estas pli profunda.

Infaneco kaj maljuneco kontaktiĝas; tio klarigas la profundajn transformiĝojn psikajn de la maljunuloj, la totalan ŝanĝiĝon de iliaj sentoj, la kreskantan malemon entrepreni novajn venkojn, la dubon aŭ renegatiĝon je la plej intimaj ideoj.

Ofte la homoj el plej klara menso, enirante la krepuskon, suferas radikan ŝanĝiĝon de opinioj pri la plej altaj problemoj filozofiaj, laŭmezure kiel dekadencas la kvalitoj origine difinitaj dum la matura aĝo.

III. <u>La bankroto de la mensoj</u>.

La irado iom-post-ioma kaj malrapida de la procezo malhelpas rimarki tiun evoluon en la personoj, kiuj ĉirkaŭas nin. La supera homo ĉesas esti tia, alniveliĝas. Liaj propraj ideoj, organizitaj dum la periodo de perfektiĝo, tendencas esti anstataŭigataj de ideoj komunaj aŭ malsuperaj.

La genio neniam estas malfrua, kvankam ĝiaj fruktoj povas montriĝi malfrue. La verkoj elpensitaj dum la junaĝo kaj verkitaj dum la maturaĝo, povas ne montri dekadencon, sed ĝin montras ja la verkoj primedititaj dum la maljunaĝo mem.

Kant estas kompleta ekzemplo de tiu psikologia metamorfozo. Junulo Kant, vere kritika, estis atinginta la konvinkon, ke la tri grandaj bastionoj de la mistikismo : Dio, Libero kaj senmorteco de la animo, estas nesubteneblaj fronte al la "pura racio". Maljuniĝinta Kant, "dogmema", eltrovis kontraŭe, ke tiuj tri fantomoj estas postulatoj de la "praktika racio", kaj do nepraj.

Lombroso (itala kriminalisto) falas sum sia lasta vivetapo en naivaĵojn infanajn, klarigeblajn pro lia mensa malfortiĝo, ĝis la ekstremo plori ĉe spiritisma tripiedo, konversaciante kun la animo de sia patrino.

Ĝems (James), kiu junaĝe pioniris la psikologion evoluisman kaj biologian, finfine implikiĝis per pri-

moralaj cerbumaĵoj, kiujn nur li komprenis.

Tolstoj, kies junaĝo produktis admirindajn romanojn, en siaj lastaj jaroj estingiĝis en mistika pilgrimado, kiu ridindigis la finajn horojn de lia fizika vivo. Lia mensa vivo jam finiĝis longe antaŭe.

IV. Psikologio de la maljunaĝo.

La sensiveco malkreskas ĉe la maljunuloj. Ili tendencas al inerteco, serĉas la plej malgrandan penon. Atrofiiĝas la noblaj elementoj de la organismo, reduktiĝas la sanga fluo al la histoj, malgrandiĝas la volumeno de la centra nervosistemo, perdas la movoj facilon kaj precizon. En la cerbo aliiĝas la ĥemiaj transformiĝoj. La ekvilibro de la organoj rompiĝis kaj ne povas daŭrigi la ekvilibron de la funkcioj.

Laŭgrade kiel la homo maljuniĝas, li infaniĝas.

La deziro plilongigi la propran vivon, ŝajne avertas al li, ke forta emocio povas foruzi energion, kaj li hardiĝas kontraŭ la doloro, samkiel la testudo retiriĝas sub sia karapaco je la priflaro de danĝero.

Ĉiu maljunulo kredas, ke la junuloj malŝatas lin kaj deziras lian morton por anstataŭi lin. Malamika al ĝi, li konsideras la junularon malsupera al la junularo de sia epoko.

La aĝo malardigas la entuziasmon. La fervoron, la kapablon krei, eltrovi aŭ simple aprezi la arton, por teni la scivolemon ĉiam vigla. Ĝi flegas fortan malinklinon al la renovigoj, al la malkovroj artaj kaj sciencaj.

La manko de plastikeco igas la novajn procezojn psikajn ne postlasi spurojn, dum la malnovaj profunde gravuriĝis sur pli sensiva materio, kaj ili forviŝiĝas nur ĉe la detruo de la organoj. La kreskado de la neŭronoj ĉe la juna homo eble klarigas la adaptiĝemon kaj la kapablon ŝanĝi siajn sistemojn ideologiajn. La ĉeso de tiuj funkcioj ĉe la maljunuloj permesas kompreni la neŝanĝeblajn konvinkojn, la maladaptiĝon al la morala etoso kaj la aberaciojn de la novofobio.

Montenj' (Montaigne) maljuna konsideris, ke je la dudekjara aĝo, ĉiu homo anoncis tion, kion oni ja po-

povas esperi de li kaj li asertis, ke neniu animo, malluma ĝis tia aĝo, iam iĝis luma.

La eltrovon de la dua principo de la moderna energio faris junulo : Karnot' havis dudekok jarojn, kiam li publikigis sian memuaron. Mejer, Ĵul' kaj Helmoc respektive havis 25, 26 kaj 25; miriga juneco de tiuj majstroj de la scienco. Oni eble diros, ke la solvo al tiuj problemoj far veraj knaboj estis malofta kaj escepta hazardo. Oni facile konstatos, ke okazas same en ĉiuj regnoj de la scienco : la plimulto el la verkoj, kiuj montris novajn direktojn, estis frukto de junuloj, kiuj estis ĵus transirintaj la 20-jaran aĝon.

La verkoj de junaj homoj havas kondiĉon esence renovigan. La meĥanismo de la publika instruado ne devas malhelpi al ili, permesante al ili ekde frua aĝo disvolvi libere siajn poveblojn en la superaj institutoj, anstataŭ elĉerpi antaŭtempe grandan nombron da sciencaj originalaj talentoj, kiel nun okazas.

V. La virto de la senpoveco.

Kial ni miru do, ke la revoluciaj junuloj iĝas finfine konservativaj aĝuloj ? Kiel povus la homo agema kaj entreprenema je la 30-jara aĝo, ne esti apatia kaj singarda, kiam li havas 80 jarojn ? Leĝo estas malmola, sed estas leĝo. Naskiĝi kaj morti estas la neŝanĝeblaj termoj de la vivo, kiu diras al ni, ke malnormale ne estas naskiĝi nek morti en la pleneco de niaj funkcioj. Ni naskiĝas por kreski; ni maljuniĝas por morti. Kion la Naturo oferas al ni por la kreskado, ĉion ĝi forprenas al ni por prepari la morton.

Mirigas la paroloj de Fage', kiam li asertas, ke la maljunuloj ne estas priatentataj. Li argumentas, ke ĉe la primitivaj popoloj, kiuj regas tiuj estas la maljunuloj. Tio ĉe ili estas klarigebla, ĉar tie la nura scienco estas la sperto, kaj la maljunuloj scias ĉion, ĉar kiu ajn nova kazo aperas al ili konata, pro antaŭa vidado de multaj similaj. Li opinias, ke la maljunulo estas forbarita en la nuntempaj mezaĉokratioj. Grava eraro, kiu pruvas nur sian malnovecon. Ĉiu dekadenca socio favoras la trivialecon kaj malamas kiun ajn individuan elstaron. Tial al la originalaj junuloj oni obstrukcas la atingon de la regado, ĝis ili estas perdintaj

sian propran konturon, atendante ke la maljunaĝo alniveligos ilin, malaltigante ilin ĝis la pens- kaj sent-manierojn komunajn al ilia socia grupo. Nur dum revoluciaj epokoj regadas la junuloj : ili efektivigis la Francan Revolucion, samkiel la Emancipadon de ambaŭ Amerikoj. Kial ni miru pri tiu mensa dekadenco, se ni alkutimiĝis vidi la foliojn senkoloriĝi kaj la arbojn senfoliiĝi, kiam alvenas aŭtuno sekvata de vintro ?

Ni admiru la maljunulojn pro la superecoj, kiujn ili posedis en sia junaĝo. La maljunuloj, kiuj kaptas la povon aŭ la funkciojn, post kiam ili pasigis siajn plej bonajn jarojn en inerteco kaj orgioj, ĉe la verda ludtapiŝo aŭ inter publikulinoj, en apatia atendo aŭ humiligita rezignacio, sen vireca parolo kaj sen fiera gesto, evitante la batalon, timante la kontraŭulojn kaj rezignante la danĝerojn, nu ! ili ne meritas la konfidon de siaj samtempuloj nek rajtas pontifiki.

Ĉapitro 7 :

# la mezaĉokratio

## I. La etoso de la mezaĉokratio.

La pasio ekbrulas, kiam la nacioj estiĝas, kaj kiam ili renoviĝas. Ili fatale havas kadencojn de malvirtiĝo, de regeneriĝo, de apatio, de ekfloro, de kadukiĝo, laŭ kies senfina alternado dividiĝas la fluado de la tempo.

Dum certaj periodoj de triviala etoso ne sonas la voĉo de la popolo : la Ŝtatoj fariĝas mezaĉokratioj. Krepuskas la kulto al la vero, la admiro, la fido, la ekzalto, la sindonemo, la malavaro.

La fervoraj adeptoj de la vulgareco estas aktoroj, al kiuj ne licas improvizi; alimaniere ili rompus la muldilon, al kiu alĝustiĝas la ceteraj pecoj de la mozaiko. La sentenco de Platono : "La demokratio estas la plej malbona el la bonaj regadsistemoj, sed ĝi estas la plej bona inter la malbonaj", konservas sian pravon. Pligraviĝas la morala dekadenco de

la regantaj klasoj : jen parvenuaj kastoj, jen industriaj sindikatoj, jen klikôj de vantaj ĉarlatanoj. Ili estas bandoj kaj sin nomas partioj. Ili intencas maski per ideoj sian monopolon pri la Ŝtato. Ili estas banditoj, kiuj kaŭras ĉe la plej senpuna krucvojo por prirabi la socion.

Senhontaj politikistoj estis en ĉiuj epokoj, sed kiam la nesciulo kredas sin egala al la studemulo, la fripono al la apostolo, la ĉarlatano al la oratoro kaj la kanajlo al la dignulo, la skalo de la merito malaperas en malhonora niveliĝo de fieco. Tio estas mezaĉokratio : morala plateco pli grava, ol la kutimiĝo al la tiraneco.

Dum tiuj parentezoj de korupto, la obsedo amasigi materialajn trezorojn forviŝas el la kolektiva spirito ĉian signon de revo. Troas la filozofoj, la saĝuloj kaj la artistoj. Ilia ĉeesto ĝenas la negoculojn, la sklavojn de ŝparemo kaj avareco.

La trivialuloj estas ĉiamdaŭraj. Varias ilia prestiĝo, varias ilia influo. Dum la epokoj de renoviga ekzaltiĝo neniu rimarkas ilin; ili kuraĝas enmiksiĝi en nenio. Kiam la idealoj malardiĝas, ili ekrimarkas sian nombron, gregiĝas laŭ partioj. Ilia influo kreskas; ili kompaktiĝas, fariĝas sistemo nekontraŭstarebla. La aspiro al la plejbono ne estas privilegio de ĉiuj generacioj. Post unu, kiu efektivigis grandan fortostreĉon pro la allogo de genio, la sekvanta ripozas kaj dediĉas sin vivi per pasintaj gloroj, solenante ilin senfide. La klikoj pridisputas la administradon, en konkurenco kripligi ĉiujn revojn.

La registaroj ne kreas tian animstaton kaj spiritan etoson : ili reprezentas ĝin. Ekfloras leĝodonantoj : multobliĝas la leĝoj, sed ilia efiko ne fortiĝas. La sciencoj fariĝas oficialaj meĥanismoj. La artoj estas industrio favorata de la Ŝtato : la imagpovo de artistoj kaj poetoj ŝajnas akriĝi por eltrovi la fendojn de la buĝeto kaj enŝteliĝi tra ili. La nivelo de la registaroj malsupreniras ĝis la absoluta nulo ĉe la historia termometro.

La koncepto pri merito fariĝas negativa : anstataŭ homojn oni preferas ombrojn. Anstataŭ heroojn, geniojn aŭ sanktulojn, al kiuj oni neas lokon por agadi,

oni postulas moderajn administrantojn.

La mezaĉokratioj liveris la venenon al Sokrato, la krucon al Kristo, la ponardon al Cezaro, la proskribon al Dante, la karceron al Galileo, la brulŝtiparon al Bruno, sed ili oferis sin servute al kretenaj registoj, kontraŭ prezo : ke ili garantiu al la altaj klasoj la necesan trankvilecon por fruktuzi siajn privilegiojn. Dum tiuj epokoj, la aŭtoritato estas facile praktikebla : la kortegoj estas popolataj de servaĉuloj, ĉarlatanoj, pulĉineloj. Ĉiu homo, kiu enoficiĝas kiel funkciulo, difektas sian personecon : li ne trenas katenon ligitan al sia piedo, kiel la sklavo, sed li kaŝe trenas ĝin, ligitan al sia destino. Kiam la aspirojn oni oferas al la avidoj, jen alproksimiĝas kadukeco.

II. La patrio.

Revoj kaj deziroj komunaj, kaj decido ilin efektivigi, tion ni bezonas por havi patrion, kiu implice enestas en la sentimentala solidareco de raso, kaj ne en la konspirado de politikistaĉoj, kiuj prosperas ĉe ĝia ombro.

Ne sufiĉas amasigi riĉaĵojn por krei patrion : Kartago ne estis tia. Entrepreno ĝi estis. Orminoj, viglaj industrioj, abundaj pluvoj, igas kiun ajn landon riĉa fokuso. Nur kulturaj idealoj kreas patrion.

Ĉia morala unueco malaperas, kiam ekmastras ĝin fiaj avidoj pri regado kaj riĉiĝo. Kaj la rimedo kontraŭ tiu krizo ne estas la fetiĉismo pri la pasinteco, sed la semado de la estonteco.

La ekzisto de la patrio eblas nur laŭmezure kiel ĝi sentigas la batadon samsonan de la koroj pro nobla perfektiĝo, kaj neniam pro fia agresemo, kiu vundas la saman senton de aliaj nacioj. Ne ekzistas pli malnobla maniero ami la patrion, ol malami la patriojn de l'ceteraj homoj.

Dum lando ne estas patrio, ĝiaj loĝantoj ne konsistigas nacion. La transfuĝintoj de la moralo ne povas koncepti la fervoron pri la nacieco. La sklavoj kaj servutuloj apenaŭ havas naskiĝlandon; nur la homo digna kaj libera povas havi patrion.

Ekzistas tamen tempoj, kiam ĝi vivas nur en la imago de kelkaj elituloj. En tiuj malmultaj kuŝas nacieco kaj ĝi vibras en ili. Fremdaj al ĝia vibrado sin tenas la milionoj da loĝantoj, kiuj manĝas kaj profitas en la lando.

Kiam la lukraj interesoj superas la idealon de la kulturitaj spiritoj, tiam la nacia sento degeneras kaj koruptiĝas : la patrio estas ekspluatata kiel industrio; la civitanoj reakiras la kondiĉon de loĝantoj, la patrio tiun de lando.

Kiam la moralaj mizeroj plagas landon, kulpas ĉiuj, kiuj ne kapablis ami ĝin kiel patrion pro manko de kulturo kaj idealoj. Kulpas ĉiuj, kiuj vivis el ĝi, sen labori por ĝi.

III. La politiko de la gregoj.

En la senidealaj popoloj, ĉia bono malaperas eklipsita de la submetiĝo. La regadon kaptas popolaĉo, kiu formanĝas la buĝeton. Velkiĝas la laŭrarbaroj kaj multiĝas la kardaroj.

Progresas akrobatoj kaj ŝnurdancistoj. Kie ĉiuj lukras, tie neniu pensas; kie ĉiuj englutas, tie neniu revas. Maldignaj ombroj ekstaraj kaj ŝajnas homoj.

La balotaj tagoj fariĝas vulgaraj finegocoj de subaĉetitoj aŭ kvereloj de aventuristoj.

Prizorgas ilian ekzistopravon senkulpaj balotantoj, kiuj iras al la parodia scenejo, kvazaŭ al festo.

Ĉiu grego formas stabon, kiu devas ekskuzi al ĝi la pretendon regi la landon kaŝante aŭdacajn prirabadojn kun la preteksto subteni la interesojn de la partio.

Riĉaj bienmastroj aŭ potencaj industriistoj pagas laŭ ora pezo la voĉdonojn kolektitajn de senhontaj peristoj. Riĉiĝintaj azenoj aspiras kuratori la popolon per la nura kapitalo de sia konstanteco kaj siaj milionoj.

La servaĉuloj kaj lakeoj vagadas en la Parlamentoj pro la flekseblеco de siaj spinoj. Ili vivas kun brilo de la aliaj, trabantoj senkoloraj kaj senpensaj, jungitaj al la ĉaro de sia ĉefo, ĉiam pretaj aplaŭdi, kiam li ekparolas kaj ekstari, kiam balotiro alvenas.

En la senspertaj demokratioj, la gregoj submetitaj, servaĉaj, senkondiĉaj, femaliĝintaj, rigardas la grego-

gardiston en atendo de gesto aŭ okulsigno. La partioj - aŭ la registaro en ilia nomo - elektas inter siaj membroj, oferante la meriton kaj favorante la intrigon. Tial certaj sentaŭgaj homoj mirinde adaptiĝas al la celoj de la universala voĉdonado. La grego genuiĝas ĉe la plej kavaj fetiĉoj kaj plenigas ilin per plej subtilaj stultaĵoj. La burokratismo malaltigas la dignon. Oni povas aserti pri ĉiu civitano transiranta la stratojn, haste, zorgoplene, jen maturaĝa, jen juna, je ĉiu horo, ke li malnobliĝas : li serĉas rekomendon aŭ portas ĝin en la poŝo.

La funkciulo prosperas en la moderna burokratio, konsistigante klason, branĉon novan de la regantaj oligarkioj, kiuj reglamentis ĝin, forprenante de ĝi la iniciatemon kaj sufokante ĝin per la rutino.

Koncernaj mankoj de la funkciulo estas la servaĉemo kaj la flatemo. La troa komplezo kaj la afektado plaĉi al la mastro naskas tiujn pestojn de la karaktero, kongruaj kun "honesteco", sed ja ne kun "virto".

La laŭdo sincera kaj sen interesa celo ne incitas nek ofendas; povas esti eraro, ne malnobleco. La flatado ĉiam estas mallojala kaj interesema. La flatemulo oferas ĉion al sia servuteca animo; lia spirito delikatiĝas nur por priflari la deziron de la mastro, al kiu li subordigas siajn ŝatojn, pensante kaj sentante samkiel li ordonas.

Oni ne nur flatas potenculojn; oni ankaŭ flatas la popolon. Por atingi ĝian amasan ŝaton, necesas mensogi al ĝi fiajn laŭdojn maskitajn per idealo, malkuragajn ĉar adresitajn al pleboj, kiuj ne kapablas malkovri la mensogon, ĉiam menciante al ili rajtojn, ne devojn.

La vantuloj vivadas fascinitaj de la flatado far la servutuloj, kiuj trenas ilin fari malnoblaĵojn. Tiun malvirton de la servaĉuloj prosperigas la mezaĉokratioj.

De tempo al tempo iu el inter la plej bonaj ekstaras kaj eldiras la veron, por ke ĉi-lasta ne estingiĝu kaj transiru al la estonteco. La Tartufoj krucosignas, ekaŭdante la herezulon.

La idealistoj ne povas servi al la mezaĉokratioj. Kiam la destino metas ilin ĉe la povo, ili regadas

kontraŭ la servutuloj kaj la rutinuloj. Neniu genio estis honorita de mezaĉokratio; kontraŭ ĝi ili batalas kaj eĉ disbatas ĝin, preparante la estontecon.

IV. La ĉeftipoj de la mezaĉokratio.

La ĉeftipoj de la mezaĉokratioj staras egaldistance de la barbaro kaj de la genio. Perfektaj en sia medio, ili flegas en sia spirito la rutinojn kaj antaŭjuĝojn de la ĉirkaŭa trivialeco. Ilia paŝado malrapida ne estas komparebla al la flugo de la kondoro nek al la rampado de la serpento.

Ĉiuj gregoj elektas la senmankan ĉeftipon inter tiuj, kiuj partoprenas iliajn pasiojn, fanatikismojn, malvirtojn, singardojn, hipokritecojn; kiuj estas senresponsaj ludiloj de alies voloj.

Kiam malaltiĝas la spirita temperaturo de iu raso, popolo aŭ klaso, ĉiam la mallertaj kaj kadukaj trovas favoran etoson. Klikoj de parvenuaj trivialuloj ligitaj per la rimeno de komunaj avidoj, arogas al si la rajton nomiĝi partioj. Ŝajnigi idealon sufiĉas por pridisputi la akaparadon de la burokrataj sinekuroj. La sentaŭguloj aldonas sian strebadon por ekzalti la brilon de sia fantomo : ilin favoras la horo, ĉar la ombroj plilongiĝas des pli kreskas la krepusko.

La kolektiva senrespondeco forviŝas la individuan kvoton de eraroj : neniu ruĝiĝas kiam la vangoj povas postuli sian parton en la komuna honto.

Ili protestas pro la trouzoj de la Potenco, sed ili longe vivas embuske, konspiras, atendante sian vicon por fari ilin por sia profito. La grupo pufigas ilin kun solidareco de loĝio; ĉiu komplico estas fadeno de la araneaĵo teksita por kapti la regadon.

La flatantoj de la trivialulo, kiun ili ekzaltas, klopodante purigi lin el ĉia peko, intencas bari la veron, nomante romantikeco lian konstantan malkapablon pri ĉiaj entreprenoj, konsekrante lin majstro pri ordo kaj virto, libera de ĉiuj malnovaj makuloj, ĉar la lipoj de la flatemuloj suĉas la akvon de la rivero Leteo, kiu forviŝas la memoron pri la pasinteco.

Kie progresas oligarkioj sub demokrataj maskoj, tie prosperas la pavoj streĉitaj de vanteco, kun la vakuo absoluta interne. Sen sango hiena, kiun bezonas la ti-

ranoj, nek sango agla, tra iliaj vejnoj fluas stulta limfo. Kiam la mezaĉokratio kovas pavidojn, ne estas etoso por aglidoj.

La rezignacia pasiveco klarigas certajn kulminojn: la estonteco de iuj ĉeftipoj baziĝas en tio esti admirataj kontraŭ aliaj. Ili forkuras por grandiĝi. Sen fiero ne ekzistas virto; tion ne montras tiuj, kiuj treme malproksimiĝas de la batalo prezentita al ilia digneco. La dignulo povas mutiĝi, kiam li ricevas vundon, timante ke lia malŝato superos la ofendon; sed lia sentenco trafas per stilo uzata nek por flati nek por peti, pli akre ol cent glavoj. Kaj la tempo ne forviŝas eĉ unu silabon de tiaj parolojj.

...........

La ĉeftipoj kutimas interrompi siajn silentojn humiligitajn per sendamaĝaj oratoraj fajreradoj. Al tiuj balonoj la oligarkioj konfidas duarangajn festivaleĉajn diplomatiajn taskojn, per kiuj ili povas pavi kun luksa bombasto. Ili daŭrigas dorloti tiujn monstrojn esperante, ke finfine ili trafos frapon sur la najlon, post kiam ili mistrafis cent sur la hufferon.

Ilia negativa influo allogas la submetitajn karakterojn : ili ne pensas, ne ŝtelas, ne subpremas, ne revas, ne murdas, ne forestas diservon, kion pli ? Kiam la bandoj forĝas la Fenikson, ili ekzaltas ĝin kiel sian plej perfektan simbolon. Programo abstrakta estas perfekta : ĝi ŝajnas idealisma kaj ne ĝenas la ideojn, kiujn ĉiu komplico kredas havi. El cent, naŭdek-naŭ mensogas la samon : la grandecon de la lando, la sanktajn principojn de l'demokratio, la interesojn de la popolo, la rajtojn de la civitano, la moralecon de la administrado. Ĉio, se ne radikiĝinta senhonteco, estas kortuŝa stulteco; ĝi ŝajnigas diri multon kaj signifas nenion. La timo al la konkretaj ideoj sin kaŝas sub la masko de la civitanaj malprecizaj formuloj. Sed kiam ili parolas pri civitanismo, ili fetoras la marĉon de sia deveno.

La popolo ilin ignoras. Dum certaj horoj, la amasoj povas esti komplicoj : la popolo neniam. Ne povus ĝi esti tia : en la mezaĉokratioj ĝi malaperas, anstataŭata de prosperantaj hordoj.

La Popoloj, tenantoj de la nacia animo, estas spiritaj ioj, nekonfuzeblaj kun la partioj. Ne sufiĉas esti amaso por esti Popolo : ĝin ne formus la unuanimeco de la servutuloj. La Popolo, antitezo de ĉiuj partioj, ne estas kalkulata laŭ nombroj. Tie ekzistas ĝi, tie unuunura homo ne implikiĝas en la komuna friponeco kontraŭ la bandoj fanatikaj, submetitaj. Tiu unuunura homo, libera, mem estas ĉio : Popolo kaj Nacio, Raso kaj Homaro.

La tri termoj psikaj de la ĉeftipoj mezaĉokratiaj estas simplaj : vanteco, senpoveco kaj favoriteco.

La ambiciulo emas supreniri ĝis kie liaj propraj flugiloj povas levi lin; la vantulo kredas jam trovigi sur la pintoj celataj de la ceteraj. La ambicio estas respektinda ĉe la genioj kaj ridinda ĉe la stultuloj.

La ĉeftipoj pagas tributon al la sepa peko : ekzistas mallaboremo en ilia senpoveco. Ili ŝatas nenifari. Ili evitas ĉian kontinuan taskon. Ili foriĝas al kiu ajn batalo, deklarante sin spektantoj. ~~Ili~~ povas praktiki malbonon pro inerteco kaj bonon pro eraro. Ilin mastras la eventoj, pro ilia senpoveco gvidi ilin.

La favoriteco estas ilia sklaveco fronte al cent interesoj, kiuj sieĝas ilin. Ili ne konas la senton pri justeco kaj la respekton pri la merito. Absolute neniam povas esti juste preferi la lakeon ol la dignulon, la ŝtipon ol la studemulon, la timulon ol la kuraĝulon.

La dignuloj punas la senhontulojn per la eterneco de sia parolo, foje erara, sed ĉiamdaŭra dum la tempo. Tiu estas ilia glavo; kiam ili elingigas ĝin, ĝi trafas rekte la koron.

La plimulto el la lakeoj preĝas per la samaj lipoj, per kiuj ili mensogas. Se ili povus, ili fortranĉus la langojn de la retoroj kaj la manojn de la verkistoj; ili fermus la bibliotekojn, por ke en ili ne laboru originalaj inteligentecoj. La hipokriteco fariĝas ilia sistemo; ili frapas sin sur la bruston por progresi.

.........

En la mezaĉokratioj, homoj malŝatitaj dum la junaĝo estas ekzaltataj dum la maljuneco; je tiu aĝo kiam la bonaj intencoj estas laciĝo de la malbonaj kutimoj. Tiu estas la plej bona garantio por la rutinema grego: ĝia abomeno al la originaleco pelas ĝin al la homoj, kiuj komencas mumiiĝi dumvive.

Dum la maljunaĝo forviŝadas la lastajn personajn trajtojn de la ĉeftipoj, iliaj komplicoj konspiras por kaŝi ilian konstantan moliĝadon, liberigante ilin de ĉia tasko.

La krepusko alvenas senindulge, guton post guto, pecon post peco, en paŭzoplena senkoloriĝo. La ĉeftipoj sentas sian sklavecon; sed ili devas morti ĉe ĝi, gardataj de la komplicoj, kiuj flegas ilian vantecon. Kaj nature kun ili ankaŭ mortas la grego. La dignuloj foriĝas de ĉia kliko, kiu prosperas ĉe la ombro de la patrio, kaj atendas alian moralan etoson, aŭ pretigas ĝin; kaj ili ne makulas siajn lipojn, nomante la ĉeftipojn, ĉar eble ĉi-lastaj estus senmortigitaj.

V. <u>La aristokratio de la merito</u>.

La iom-post-ioma entrudiĝo de la demokratio komencis niveli ĉiujn sistemojn, burĝigante ilin. La mezaĉokratio ne toleras la brilajn esceptojn. La civilizo ŝajne tendencas al la malrapida kaj iom-post-ioma proskribo de la eksterordinara homo, briligante la trivialan. Oni povus esprimi jene la formulon de la alniveliĝo : laŭmezure kiel disvastiĝas la demokratio, reduktiĝas la funkcio de la superaj homoj. La naturo kontraŭstaras ĉian alniveliĝon, ĉar en ĉia egaleco ĝi vidas la morton. La homsocio bezonas por la morala progreso la genion pli ol la kretenon; la talentulon pli ol la trivialulon.

Estas ironie ripeti, ke la Ŝtatoj neniam bezonas genian registon. En la krizaj horoj la popoloj ĉion esperas pri la grandaj homoj; en la dekadencaj, sufiĉas la vulgaruloj. Kiu diras : "Egalecon aŭ Morton", al tiu la naturo replikas : "Egaleco estas <u>la</u> Morto". Nia speco eliris el la antaŭaj kiel rezulto de la natura selektado. Egaligi ĉiujn homojn estus fornei la progreson de la homa speco, la civilizon mem.

Ne ekzistis ĝis nun efektiva demokratio. La reĝimoj, kiuj adoptis tiun nomon, estis komplotoj por ekspluati la homamasojn kaj flankenlasi la eminentulojn. Ili estis nur mezaĉokratioj. La amasoj malriĉaj kaj sensciaj ĝis nun ne havis kapablon regi sin mem : ili ŝanĝis siajn paŝtistojn. La egaleco estis miraĝo : la popolo forestis en ĝi.

La aristokrataj kastoj ne estas pli bonaj; en ili ankaŭ estas krizoj de trivialeco kaj ili fariĝas mezaĉokratioj. La demokratoj eraras, serĉante la justecon en egaleco. La aristokratoj primokas la meriton per la samniveliĝo. Ili ambaŭ estas malamikoj de la natura selektado.

Ĉiu aristokratio kutime estas selektema ĉe ĝia origino : homoj, kiuj gvidas ombrojn, rajto justa kaj natura. Sed estas ridinda la koncepto de la tradiciaj aristokratioj. Kial familianoj kaj lakeoj de iamaj kapabluloj daŭrigas partopreni potencon, kiun ili ne kontribuis krei ? Ĉu je la nomo de la heredo ?

En landoj sen aristokrataj kastoj, pli inklinaj al la trivialigo, formiĝas oligarkioj de parvenuoj, kiuj havas ĉiujn mankojn de la nobelaro, ne posedante ĝiajn virtojn. Ĉu estas preferinde obei al kastoj, kiuj posedas la rutinon komandi, aŭ al bandoj koruptitaj de servutaj kutimoj ?

La privilegio de la sango incitas la demokratojn kaj la privilegio de la baloto naŭzas la aristokratojn. La ora lulilo ne donas kapablojn, ankaŭ ne la balotujo.

La historio ripetiĝas ĉiam : la amasoj kaj la idealistoj estas propekaj kaproj en tiuj disputoj inter feŭdestroj kaj redingotaj burĝoj.

..........

La pasia protesto de la idealistoj povas esti alarmkrio, sed la bandaĉoj preferas atenti la falsan idealismon de siaj maljunaj fetiĉoj. Necesas atendi pli bonajn tempojn, sen troaj pesimismoj.

Kiam la trivialeco elĉerpas la lastajn rimedojn de sia nekompetenteco, tiam ĝi dronas, kaj la pereo redonas al la merito ĝian rangon kaj postulas la intervenon de la genio.

Malaperas la privilegio kaj la morala gvidado de la socio revenas al la plej bonaj manoj. Estas natura aristokrateco, kiam la strebado de la plej kapablaj mensoj kunfluas al la direktado de la komuna destino de la nacio. En la aristokratio de la merito apartenas tiom al la virto kaj la karaktero, kiom al la inteligenteco mem; aliel ĝi estus nekompleta kaj senefika.

Reĝimo, kiu la individuan meriton taksus en ĉefa rango, estus perfekta. Ĝi ekskludus kiun ajn influon nombran aŭ oligarkian, konvenciojn kaj kompromisojn. La sennoma voĉdono havus tiel etan valoron, kiel la hazarda blazono. La homoj klopodus esti ĉiam pli kaj pli malegalaj unu al la alia, preferante kiun ajn kreivan originalecon ol la plej tradician rutinon.

La aristokratio de la merito estas la ideala reĝimo, kontraŭ la mezaĉokratioj mallumigantaj la historion. Ĝi havas absolutan formulon : "Justeco en Malegaleco".

Ĉapitro 8 :

# "la forĝistoj de idealoj"

## I. La etoso de la genio.

La geniuleco estas koincido. La eksterordinara homo atingas ĝin, nur se li trovas favoran etoson : eĉ la plej bona semo bezonas la plej fekundan grundon. La funkcio postulas organon : la geniulo aktualigas la potencialojn.

La etoso konsistigas la klimakson de la genio kaj la oportuneco signas lian horon; ja sen tiuj povas fariĝi genio neniu escepta cerbo. La verko genia ne estas ekskluziva frukto de la persona inspiro, nek feliĉa akcidento, kiu kurbigas la fluon de la historio; en ĝi partoprenas personaj kapabloj kaj senfinaj cirkonstancoj. Li estas rekta kaj nekontraŭstarebla : li suprenflugas superante barojn, ĝis atingi la pintojn. Ne alvenante je la ĝusta horo, tiu homo vivus fluktue sed li ne estus genio, se tiun nomon ne pravigus la

efektivigita verko kaj se li malhavus la oportunecon en sia medio.

La flatemuloj ornamas manplene per la rango de genio la potenculojn. La pura genieco estas rekonebla per la verko, realigata tra la jaroj; pro tio la samtempuloj ne paŝas laŭ la takto de la genio; sed se ĉi-lasta plenumis sian mision, nova generacio povos kompreni lin.

Lia venko dependas de lia propra kapablo plenumiĝin kaj ne de la malfortikaj sankcioj de la samtempuloj.

..........

Konvenas forlasi ĉian hierarkian tavoligon de la genioj : trans certa nivelo ĉiuj pintoj estas sublimaj. La genieco ne estas klasifikebla.

La grandaj historiaj transformiĝoj naskiĝas el lirikaj antaŭvidoj de la artaj geniuloj, kunfandiĝas en la doktrino de la pensuloj kaj efektiviĝas per la klopodoj de la ŝtatistoj. La genieco fariĝas funkcio en la popoloj kaj ekfloras je fatale neŝanĝeblaj cirkonstancoj.

La genio estas forto aganta laŭ la funkcio de la medio. Neniu povus pensi pri la edukado kaj kulturo de ĉi-tiu kontinento (Sudameriko), ne menciante la nomon de Sarmiento (pr: sarmjento)(°) apostolo kaj semanto, kiu estis egaligata de neniu posteulo lia

------

(°) Argentino, naskita en 1811; mortis en 1888. Ido de modesta familio el purhispana deveno, li estas modelo de aŭtodidakto, kiu atingis la plej altajn pintojn en la politiko kaj la kulturo de sia epoko : provincestro, ministro, deputito, senatano, ambasadoro, Prezidento. Batalema kaj kuraĝa ĵurnalisto; li estis aŭtoro de pli ol 50 verkoj kun fono politika, eduka, kultura, el kiuj elstaras : "Fakundo" kaj "Provincaj Rememoroj". Sed al la edukado de la popolo li dediĉis siajn energiojn kaj siajn strebadojn, konsiderante, ke sen instruiteco de la popoltavoloj neniu lando povas aspiri progreson kaj grandecon. Ankoraŭ pridiskutata kaj kontraŭbatalata, tamen argentinoj ĝis nun ne kapablis nek sukcesis atingi la celojn, kiujn li difinis por ni en tiu ĉi jarcento.

en la regado kaj la edukado. Li estas la pragmatisma genio.

En la disvolviĝo de la evoluismaj doktrinoj la konceptoj de Ameghino (pr: amegino) estas mejloŝtono. Neeblas ne rimarki liajn postesignojn, kaj kiu lin forgesus, tiu rezignus koni multajn kampojn de la scienco esploritajn de li. Li estis la rivela genio.

II. Sarmiento.

Ciklopo en la laborado, li vivis obsedata de la dezirego edukadi, organizadi civilizante, pliboniĝadi edukante. Ĉiuj fontoj estis malsufiĉaj por satigi lian soifon lernadi. Vireca kaj stara, ĉiama standardisto de siaj propraj idealoj, li sekvis la vojojn, kiujn la destino montris al li, kvazaŭ li obeus al neŝanceliebla determinismo.

"Fakundo" (biografio pri la politika regiona gvidisto Fakundo Kiroga) estas la lamento de la moderna kulturo dum la feŭdisma krepusko. Libro estas pli ol intenco : gesto ĝi estas. La profeta parolo de S. ŝajnas malsupreniri el Sinajo. Anatemo ĝi estas tiel laŭta, ke foje la prozo raŭkiĝas, la vervo kreas propran stilon, kiu tamen ne ŝajnas hispanlingva. Li skuas tutan kontinenton per la forto de nura plumo ŝtaligita de la danĝero kaj la ekzilo. La profeta prozo vivas, pulsas, atakas, emocias, disbatas, neniigas. Oni povus diri, ke en tiuj frazoj verŝiĝas lavange la tuta animo de la lando, kaj erao de barbareco falas mortbatita.

Li unue diris... poste faris. Prezidento de la Respubliko kontraŭ la intenco de ĉiuj, supre li vivis batalante kiel malsupre; lia laboro estis la batalo, lia ripozo la lukto. Li sin tenis flanke kaj super ĉiuj partioj, nekapablaj bremsi lin. La mondo ŝajnis al li malgranda por brakumi ĝin; nur lia povis esti la nekonfuzebla moto : "Oni devas fari la aferojn; mise, sed fari ilin".

Li estus preferinta morti pro soifo, ol trinki ĉe la fonto de la Rutino. Entuziasma pri la Patrio,kies grandecon li kutimis rigardi patrece, li estis ankaŭ senkompata pri ĝiaj mankoj, kiujn li kaŭterizis per

la bonfara krueleco de kirurgo.

La unueco de lia verko estas absoluta; sian kondutlinion li konservis ĝis sia morto. Li atingis siajn okdek jarojn, perfektigante la originalecojn, kiujn li akiris je la trideka jaraĝo. Li eraris sennombre da fojoj; li ŝanĝis sian opinion milfoje rilate la detalojn, ĉar li neniam ĉesis vivi : li kapablis fluktui senfine sed neniam ĉesis esti si mem.

Li ĉiam rigardis al la estonteco, kvazaŭ la pasinteco estus mortinta je lia dorso. Por li hieraŭ ne ekzistis, vidalvide al morgaŭ. La homoj kaj popoloj dekadencaj vivas memorante de kie ili venas; la genioj kaj fortaj popoloj bezonas scii, nur kien ili iras. Kreante ĉiam, li neniam havis la rezignacian paciencon de tiu, kiu konformiĝas al la cirkonstancoj por trankvile vegeti. Multaj homoj kutime cedas, kiam la spiritaj risortoj eksentas la ruston de la maljunaĝo. S. estis escepto; li naskiĝis "tia" kaj volis vivi tia, kia li estis, ne senkoloriĝante je la duontono de la aliaj.

Kiam fanatikuloj kaj servutuloj agresis lin por disbati liajn idealojn de kulturo laika kaj scienca, vane li estus ekribelinta kontraŭ sia destino, kiu senkontraŭstare elektis lin kiel heroldon de la epoko, spronante lin senripoze persistadi ĝis la rando de la tombo mem. En liaj malekvilibroj estis baraktoj de enkaĝigita aglo. En sia medio li estis "malaktuala"; la genio ĉiam implicas anticipiĝon. Lia originaleco limis deliron, sed lia malekvilibro ne ne estis ena al lia personeco, sed ekstera inter li kaj la medio.

Li personigis la plej grandan batalon inter la pasinteco kaj la estonteco de la kontinento, prenante kun troigo la respondecon de sia destino. Homoj kiaj S. povas forbruli pro la funkcio, kiun ili plenumas; la nesciuloj konfuzas ilian pasion kun la frenezo. La disfluoj, la malharmonioj de S. estas progreso; liaj malakordoj estis ribeloj kontraŭ rutino, antaŭjuĝoj, submetiĝoj. La genio, moviĝante rekte kaj rapide, mallongigas la mezan vojon kaj malkovras la malproksiman reagon; la frenezulo, saltante de unu

procezo al alia, sen meza vojo, stultas kaj ne rezonas. Tiu estas la ŝajna analogio inter genio kaj frenezo; en la movado de ambaŭ ŝajne mankas la meza vojo, sed ĝuste la genio flugas, la frenezulo saltas.

Kiam li komencis maljuniĝi, liaj propraj kontraŭuloj lernis toleri lin, kvankam sen la grandanima gesto de dankema admiro. Ili daŭrigis nomi lin : "la frenezulo S." Tiuj vortoj instruas pli, ol cent libroj pri la malfortiko de la socia juĝo. Neniu glora amerikano suferis pli grandan mokadon de siaj kuncivitanoj. Ne ekzistas insultvorto, kiu ne estis uzita kontraŭ li; sed la tuta vortaro ne sufiĉis por senfamigi lin antaŭ la posteularo. La karikaturistoj manipulis la krajonon kun akreco de stileto kaj venenaj nuancoj mordante lin diskarne. La vulgaruloj sieĝis S. ĉiuflanke, per la forto de la nombro, senresponse je la estonteco; kaj li - rulvolva kaj agresa - marŝadis kun la ebrieco de la batalo meze de medio tempesta, semante ĉiudirekten, ĉiusulken. Ĉia supereco ofte estas proskribo ; la grandaj pensuloj estas solece proskribitaj en sia propra medio.

Pli ol ĉe alia geniulo el la historio, cementiĝis ĉe S. la koncepto de la civilizo de lia raso, en la horo preluda de novaj naciecoj naskiĝantaj el la barbara ĥaoso. Por pli bone cerbumi, li vivadis solece en la amaso, jen en eksterlando, jen proskribita en sia propra lando, eŭropano ĉe argentinoj kaj argentino en fremdlando, provincano en Bajreso kaj bajresano en provincoj. En la dia frenezo, kiun Erasmo laŭdis sur nepereemaj paĝoj kaj pri kiu la trivialuloj akuzis la eminentan viron, kiu honoras tutan kontinenton, S. gigantiĝis sub la hakilfrapado.

III. <u>Ameghino</u> (pr: amegino)(Florenteno Amegino, argentina antropologo)

Laŭ stranga koincido, S. kaj A. ambaŭ estis instruistoj, aŭtodidaktoj, sen universitata diplomo, modlitaj ekster la metropolo en tuja kontakto kun la naturo, fremdaj al ĉiuj implikiĝoj de la mondumaj mensogoj, kun manoj, koroj, kapo kaj flugiloj liberaj.

La ampleksa verkaro de A. en nia kontinento kaj nia epoko havas karakterojn de natura fenomeno. Necese devis argentina genio, ĉar neniu alia loko el la tera supraĵo enhavas fosilian faŭnon kompareblan al la nia; devis esti en nia jarcento, ĉar estus mankinta al li la fundamento de la evoluismaj doktrinoj; ne povus esti antaŭe, ĉar la intelekta etoso de la lando ne favoris tion, antaŭ la fekundiga aktivado de S.; kaj necese devis esti A, kaj neniu alia homo el tiu epoko.

Firman kaj serenan volon li bezonis por plenumi sian genian funkcion. Senkonscie kaj senvole neniu kreas daŭrajn kaj valorajn aferojn. Ne sufiĉas imago por vivantigi la verkon : ĝin naskas la volo. En tiu senco, la disvolvado de la ĝenaskaj povebloj postulas "longan paciencon" por ke la inteligenteco fariĝu talento aŭ kresku ĝis genieco. Sen eksterordinaraj kapabloj, nura pacienco ne produktas unu Ameginon. Kreteno, dum kvindek jaroj da pacienco, sukcesus nur fosiliigi sian kretenecon. La genio, en la daŭro de ekfulmo ekvidas sian Idealon, kiun li sekvas dum sia tuta vivo. Fekunda agro neplugita ne donas rikoltojn; nek donas ilin la nefekunda agro, kiom ajn oni plugas ĝin.

Kio odoras je laceco, tio estas antitezo de genio. Ĉi-titolon oni povas liveri al tiu, kies verkoj ne montras la penadon de la manlaboristo, sed iuspecan kapablon neantaŭviditan, kiu efikas senrimarke, almenaŭ per forto kaj rezulto, kiu superas liajn intencojn aŭ strebojn. Genio estas spirito, gvido kaj inspiro, laŭ la difino de l'helenoj.

La verkaro de A. estas kreiva : tio karakterizas ĝin. Grandega paleontologia faŭno restis en la mistero antaŭ ol li malkaŝis ĝin al la moderna scienco, kaj formulis ĝeneralan teorion por klarigi ĝiajn migradojn en praepokoj.

La genieco induktas leĝojn, kiuj esprimas neatenditan rilaton inter la aferoj, montras punktojn, kiuj taŭgas kiel centro de mil disvolvoj kaj malfermas vojojn al la senfina esplorado de la naturo.

Kia ĝi estas, do ? Ĝi estas simpla, ĉar ĝi dependas de komplika strukturo de la cerbo kaj ne de fan-

taziaj estaĵoj; kaj escepta, ĉar en la mondo svarmas la malsanuloj kaj malofte aperas iu A.

Ju pli bone strukturita estas la cerbo de la homo, des pli alta kaj supera estas lia pensfunkcio. Ni naskiĝas en tre varia skalo de inteligenteco, kun kapabloj subordigitaj al la strukturo kaj aranĝo de la ĉeloj, kiuj kontribuas al la formado de la penso; la heredo kontribuas doni nervosistemon, akran aŭ malakran, laŭ la kazoj. La edukado povas perfektigi tiujn kapablojn aŭ poveblojn, kiam ili ekzistas; ĝi ne povas krei ilin, kiam ili mankas.

La kreiva fekundeco postulas la kunlaboron de la imagpovo. La sentiveco estas la kompleksa instrumento metita je la servo de la imago, kvankam lastanalize ĝi povis formiĝi nur per donitaĵoj de la sentiveco mem.

Ĉe la spekulativaj genioj, kiaj A., aperas evidente la superrego de la imago super la sensoj. En la tekstigo de lia doktrino, la genieco de A. montriĝas per absoluta unueco kaj kontinueco de strebado, per alta harmonio kaj per ekvilibro, antitezoj de la frenezo. A. kontraŭdiris sin mem multfoje en la detaloj, perdante neniam la sencon de la totala orientiĝo; la spekulativa genio naskiĝas rekte kiel lumradio neestingebla.

Al la celo li aliras laŭ ĉiuj vojoj; nenio devojigas lin. Alten kaj malproksimen li flugas sen la singardemo, kiu baras la marŝadon de la trivialuloj.

Ili kutimas erari, sed iliaj eraroj provokas serĉadojn, vigligas pasiojn, forigas inertecojn. En la erarantaj genioj estas maskla firmeco, kiu trudas respekton al ĉiuj.

IV. La moralo de la geniulo.

La moralo de la geniulo ne estas mezurebla laŭ la leĝoj validaj en la kateĥismoj : neniu mezurus la alton de Himalajo per poŝa mezur-rubando. La geniulo ne konas la artojn de la grimpado kaj la industriojn de la materia prospero. Li neniam havas animon de funkciulo. Li eltenas heroe sian malriĉon, ne vivante el favoroj burokrataj, ne vendante siajn verkojn al la registaro, ne ĉerpante el la oficiala buĝeto. Li ignoras

la teknikon de la falsaj oficialaj geniuloj, kiuj ŝajnigas meritojn por prosperi en la ombro de la Ŝtato.

Li neniam cedas al la impulsoj de fiaj interesoj; li abomenas la malbonon; li ne konas la falson. Li amas en la Patrio ĉiujn kuncivitanojn kaj sentas en sia animo la vibradon de la homara animo. Lia sincero tremigas la hipokritulojn kaj li diras la veron per tiel persona stilo, ke nur liaj povas esti la paroloj. Li toleras la erarojn de l'ceteraj, memorante pri la propraj. Li ekkoleras ĉe la friponaĵoj, per vortoj kun apokalipsa ritmo kaj katapulta efiko. Li kredas je si mem kaj ne kompromisas kun la dogmoj de siaj furiozaj sieĝantoj.

Fido estas lia forto. Kion li entreprenas, tion li decidas finfari. La barojn li kaptas, ilin defias, ilin atakas, ilin venkas fiere.

Kontraŭ la trivialeco, kiu sieĝas la originalajn spiritojn, konvenas fortigi la kulton al la genio. Meti la propran fidon en iu revo, pasie, kun plej forta emocio, estas supreniri al la pintoj, kie ŝvebas la gloro. Instruante admiri la geniecon, sankt-econ kaj heroecon, oni kreas etosojn favorajn al ĝia alveno.

La idoloj de la fanatikismoj mortis en la kuro de l'jarcentoj, kaj nepre mortos la venontaj, senkompate falĉitaj de la tempo. Estas io pli daŭra ol la superstiĉa miraĝo de la dieco : la ekzemplo de la altaj virtoj. La sanktuloj de la idealista moralo ne faras miraklojn; ili efektivigas grandajn verkojn, kreas belojn, serĉas verojn; kaj ili ĉiam tuŝos la korojn, kiuj flegas dezirojn pri perfektiĝo.

FINO.

Gérant & imprimeur : C. Baudé, 47340 Laroque. T.